

BULGARA

ESPERANTISTO



ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

Feliĉan novjaron!



12-1980



Al ĉiuj legantoj kaj kunlaborantoj la redakcio de „Bulgara Esperantisto“ bondeziras sanon, feliĉon kaj novajn sukcesojn en ilia laboro dum la Nova 1981 jaro!

Redakta komitato:

Kunĉo VÁLEV (ĉefredaktoro), Vasil BOROVIANSKI, Evgeni GEORGIEV, Dimitro DENĈEV, Dimitro HAĜIEV, Krăstju KARUCIN, Haim LEVI (vicĉefredaktoro), Flori NIKOLOV.

Administranto: Metodj Garev
Korektis: Rajna Konstantinova

Sofio, p. k. 66

Tel. 31-00-29

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919
Eldonkvanto 6100.

Adreso de la redakcio:

„Bulgara Esperantisto“ — bul. Ĥristo Botev 97,
1303 Sofio, Bulgario.

ENHAVO

*** Per konkurado — al novaj sukcesoj!	1
Geno Manev. Aktuala porpaca laboro	2
Evgeni Georgiev. Regiona E-renkontigo	2
K. K. Altiri la vastan publikon	2
*** III Internacia Medicina E-Konferenco	2
*** Oficiala komuniko de la Akademio de Esperanto	3
D-ro L. L. Zamenhof. Letero al Ilja Davidoviĉ Cstrovskij	3
Bojana Prodanova. Esperanto peras	3
Stefan Ĉolakov. La Esperanto-paĝo de „Zaria“	4
Georgi Pramatarski. Konataĵo kaj nekonataĵo pri la novjarfestaj kutimoj	5
Prof. d-ro Stojan Ĝugev. Akad. Petro Dinekov — verkisto, sciencisto, mondlingvisto	6
Petro Dinekov. Amo	6
Petro Dinekov. La mondo de Jordan Jovkov	7
Jordan Jovkov. Malamikoj	8
Jean Lezan. Letero	11
Trojan Vojtech. Tia ideo estas realigebla	12
Nikola Aleksiev. Paradoksa kaj ege malutila kutimo	13
Vladimir Bepalov. Aktiveco inter Soĉi kaj Rimini	14
Sergej Kocarj. Vigla instrulaboro en Krasnodar	14
Enn Ernits. La e-istoj celebris la jubileon de Tartu	14
*** Urga: ekspozicioj organizotaj	14
Dimitro Haĝiev. Vivo dediĉita al la popolo	15
Nguyen Trai. Proklamo de la venko super la Ngo-invadintoj (fragmentoj)	16
*** Deziras korespondi	16
Bistra Dojĉinova. Mi estis en Lantov	III
*** Antaŭ la Nacia Junulara Revuo de la E-Parolo kaj Kanto	III
*** Programo de la Internacia Esperanto-Kursejo por 1981	IV

NIAJ PERANTOJ

Alfabeto laŭ landoj:

Britio, Covenham Louth, Lincs, LN 11 OPF
Laycroft Main Road, s-ro Paul Hewitt

Ĉeĥoslovakio, Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Jiřska 10, 11000 Praha 1.

Ĉeĥoslovakio, 040 01 Košice, Šmerova 35/1, Esperantisto Slovaka, Daniel Papak

Francio, F-54510 Tomblaine, B. P. 23,

s-ro Roger Degrelle

Jarabono 20. — f. f.

Finnlando, PL 221, SF 70 101, Kuopio 10,

Finna Esperanto-librejo

Jarabono: 20 fl

Germana Demokratia Respubliko,

DDR 108 Berlin, Charlotten str. 60,

Centra Laborrondo Esperanto

Germana Fed. Respubliko, Esperanto-eldonejo Palatina

kkir Iggebach, Schlossgasse 30, poŝtekkonto n-ro 1658

48-678 ISHFN D-6731 Elmstein

Jarabono: 8 gmk.

Hispanio, Gijon Asturias, Ramon y Cial,
44-3° — Izqda, s-ro Adonis Gonzales Meana
Jarabono: 300 ptoj

Hungario, „Budapeŝta Informilo“, p. k. 153, H-1443 Budapest

Kubo, Ciego de Avila,
apartado 223, Pedro P. Lamas Diaz

Mongolio, Ulan-Bator, poŝtkesto 733,

Mongola Esperanto-Asocio

Nov-Zelando, N. Z. Esperanto Assn. book dept. 180

Onepu RD, Lyall Bay Wellington.

Portugalia, Portugala Esperanto-Asocio R. DR. Joao

Couto, 6 R/C. A Lisboa-4

Jarabono: 260 eks.

Sovet-Unio, 200016 Tallinn, Estonio, do vostrebovanja,

Johannes Palu

Jarabono: 5 rubloj

Vjetnamio, Hanoi, 222 Dôl Càn,

Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio



PER KONKURADO — AL NOVAJ SUKCESOJ:

Denove al nobla socialisma konkurado inter E-societoj kaj sekcioj de BEA! Decidon pri la nova konkurado prenis la plenkunsido de la Centra Estraro, okazinta la 3an de novembro. Ĝi koncernas la periodon 1 de novembro 1980 — 31 de julio 1982.

La konkurado antaŭ nia 40a jubilea kongreso donis puŝon al la agado de multe da societoj kaj de kelkaj asociaj sekcioj kaj per tio — vigligon en la ĉiukampa agado de BEA. La rezultoj estas tre kontentigaj. Kompreneble, tio ne estas kaŭzo ne vidi ankaŭ la mankojn: ne ĉiuj societoj kaj sekcioj aliĝis al la konkurado, iuj societoj ne aktivis sur ĉiuj kampoj de l'asocia agado, kelkfoje ne venis ĝustaj tempaj aŭ plenaj informoj pri ĉio farita. Do, ni bone lernu el la ĝisnuna sperto!

La kondiĉoj de la nova konkurado ne diferencas de la kondiĉoj de la antaŭkongresa konkurado. Estas iom pli ĝustaj la konkurgrupoj, apartiĝis en nova grupo la vilaĝaj societoj, pli precizaj estas kelkaj indicoj. Kun ĉio ĉi oni devas konatiĝi pere de la regularo de la konkurado, eldonita aparte kaj sendita al ĉiu societo, distrikta estraro kaj asocia sekcio.

Sur ĉiuj kampoj de la vivo en nia socialisma patrujo nun sentiĝas alta levigo. Ĝin inspiras la antaŭstaranta XII kongreso de la Bulgara Komunista Partio — gvidanto de nia lando kaj popolo. Ĉiu homo en nia patrolando nun streĉe kontribuas al plua disfloro de la naciaj ekonomiko, scienco, literaturo, kulturo.

En 1981 nia popolo celebros la 1300-datrevenon de la fondiĝo de la bulgara ŝtato, en 1982 — 100 jarojn de la naskiĝo de la granda bulgara filo, fama gvidanto de la internacia laborista movado kaj fondinto de nia socialisma ŝtato Georgi Dimitrov. Tiuj gloraj eventoj de nun aktivigas la kreaĵn popolaĵn fortojn. Ni, la bulgaraj esperantistoj, ankaŭ aldonas niajn strebojn al tiu tutpopola socialisma konkurado. Sed ni havas ankaŭ nian propran kazon streĉi la fortojn: en aŭgusto 1982 ni celebros la 75-jaran jubileon de la Bulgara Esperantista Asocio.

Do, denove ni strebu antaŭen kaj supren! Per la nova konkurado ni rikoltu novajn, ĉiam pli grandajn sukcesojn en nia laboro por Esperanto, por la socialismo, por la paco!

PLENKUNSIDO DE LA CENTRA ESTRARO DE BEA

La 3an de novembro en Sofio okazis plenkunsido de la Centra Estraro de BEA.

La prezidanto de BEA k-do Hristo Gorov legis pritakson pri la 40a jubilea kongreso de BEA kaj surbaze de ĝi — konkretan agadprogramon. Tiu programo, kompletigita per la faritaj rekomendoj, estis poste sendita al la distriktaĵoj kaj societaĵoj estraroj.

Informojn pri la kongresoj de UEA en Stokholmo kaj de TEJO en Rauma faris Hristo Gorov kaj Dimitro Papazov.

Pri la laboro de la Monda Parlamento de la Popoloj por Paco raportis k-do Nikola Aleksiev.

La ĉefredaktoro de „BE“ k-do Kunčo Vălev atentigis la membrojn de CE pri la urga neceso ĉiel subteni la abonkampanjon, por ke la societoj povu plenumi la fiksitaĵojn por ili kontroliferojn.

Fine k-do Krăstju Karucin legis projekton de teksto por socialisma konkurado inter la E-societoj lige kun XII kongreso de BKP kaj la 1300-jariĝo de la bulgara ŝtato.

Estimataj,

AL BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

Permesu al ni atentigi vin pri mirinda E-spektaklo, kiu naskiĝis en via lando, en la ŝtata pupteatro de Gabrovo. La teatro prezentis en la 13a Panteatra Internacia Festivalo en Zagreb, Jugoslavio, la teatraĵon „Rakonto pri kateto, ŝteto kaj ankoraŭ io“ de Zlatina Biljarska. Kvankam unuavice dediĉita al infana publiko, la humana teksto de tiu spektaklo turniĝas ankaŭ al plenkreskuloj. Ĝi gajnis plurajn premiojn en la ĉi-jara PIF, inkluzive premion pro la homama mesaĝo. La tuta spektaklo (kun kantoj) estas jam preparita en senproba E-o. Ĉu ne estus eble, ke la aktoroj, kiuj tiom penis por majstri la tekston, prezentu ĝin antaŭ E-publiko en via lando?

Ni ŝojas, se nia opinio montriĝus realigebla, kaj volonte havus vian respondon.

Amike vin salutas

SPOMENKA ŠTIMEC, sekretariino de PIF



AKTUALA PORPACA LABORO

Lige kun la Monda Parlamento de la Popoloj por Paco, okazinta septembre en Sofio, E-Societo „Ivan Vladkov“ en urbo Drjanovo aligis aktive siajn fortojn al la porpaca batalo de nia popolo.

La societo havigis al si la dokumentan libron pri la bombado de Hiroŝima kaj Nagazaki, eldonitan esperantlingve en Japanio. Kune kun la Urba Pacdefenda Komitato ni elektis fotojn, kiuj montras la detruan forton de la atombombo — tiu „malnova“ jam amasmortigilo. Al nia kunlaboranto ni donis la taskon fari grandformatajn fotojn. Li preparis ĉ. 400 fotojn, kiujn ni distribuis al ĉiuj entreprenoj en la urbo, ankaŭ al vilaĝoj Burja, Sokolovo kaj Gostilica. En la centro de la urbo ni aranĝis vitrinon kune kun la Komitato de la Patrolanda Fronto. Tiel ni ankoraŭfoje montris la grandan minacon, kiu pendas super la mondo pro la militarisma politiko de la burĝaj regantoj en Usono kaj Okcidenta Eŭropo, kaj la neceson aktivigi la porpacan batalon.

Geno Manev

REGIONA JUNULARA E-RENKONTIĜO

Je la 24—25a de oktobro en urbo Blagoevgrad okazis regiona E-renkontiĝo de Sudokcidenta Bulgario lige kun la 110a datreveno ĉde la naskiĝo de V. I. Lenin. La aranĝon partoprenis 55 gejunuloj el Blagoevgrad, Petriĉ, Rila, Stanke Dimitrov, Sofio, Botevgrad, Vidin. La programo inkluzivis vesperamuzon kun diskoteko (sabate) kaj laboran kunvenon (dimanche).

La kunveno estis malfermita de la prezidantino de BEJ Steliana Dimitrova, kiu faris mallongan paroladon pri la granda Lenin. Sekvis ampleksa prelego de la ĝenerala sekretario de BEA k-do Kunco Vălev pri „La rolo de Esperanto por la kultura riĉiĝo de la junularo“. Poste okazis diskutado pri la tuŝita temo kaj interŝanĝo de spertoj pri la junulara agado.

La renkontiĝo kontribuis al diskonigo de la kulturaj valoroj de E-o kaj ties disvastigo en la junularaj medioj de Sudokcidenta Bulgario.

Evgeni Georgiev

ALTIRI LA VASTAN PUBLIKON!

Jam venas la tempo, kiam la arto devas vaste eniri nian E-propagandon. Kaj ju pli baldaŭ kaj pli grandskale oni tion farus, des pli bone por nia afero. Por vekti la interesigon de pli multnombra neesperantista publiko, la E-societo en u. Blagoevgrad organizis je la 13 de novembro grandan kunvenon-koncerton. Sur la afiŝoj pri tiu aranĝo oni ne emfazis, ke ĝi estas esperantista, ĉar tiam venos nur e-istoj. Kaj vere nun kolektiĝis sufiĉa publiko — pli ol 150 personoj, precipe studenta junularo (la aranĝo okazis en la granda halo de la universitato).

Prelegon je temo „La lingvo de la internacia amikeco“ faris k-do Kunco Vălev — ĝenerala sekretario de BEA. Sekvis riĉa koncerto de la konataj E-kantistoj Marija Angelova — soprano el la Ĉefa Direkcie „Bulgara Muziko“, kaj Dimitro Denčev — tenoro. Ili plenumis pecojn de Dobri Hristov, Cajkovskij, Musorgskij, Subert, Verdi, Bize k.a., ankaŭ bulgarajn popolkantojn kaj popularajn kantojn de aliaj popoloj. La kantoj estis en la lingvoj bulgara, rusa, itala, hispana, slovaka kaj Esperanto. Akompanis la konata pianistino Snejana Barova.

Fine gejunuloj el Blagoevgrad prezentis humuraĵojn.

Oni alvokis la publikon lerni E-on en tuj malfermata kurso.

Plej grandan meriton por tiu sukcesa aranĝo havas la prezidantino de la loka E-societo Dimitrina Tončeva, kiu persone laboris kaj ankaŭ bone distribuis la taskojn inter aktivuloj.

Simila kunveno-koncerto kun la sama programo kaj la samaj plenumantoj okazis la sekvan vesperon en la kulturdomo de u. Bansko. Ĝi estis organizita de la loka E-societo (prezidantino Marija Kojareva) kaj la kulturdomo. Ĉeestis 70-persona miksa publiko. Oni anoncis E-kurson.

Ni opinias, ke tiu formo — altnivela diverslingva koncerto kun prelego pri nia lingvo kaj afero — estas tre bona por atentigi la publikon pri nia afero. Samtempe oni tiumaniere kreas novajn kulturajn valorojn en la Internacia lingvo.

K. K.

Entuziasma E-Kurso

En la komenco de oktobro ekfunkciis E-kurso en Transporta Hospitalo de Plovdiv — por la medicina personaro.

Dank' al la bonega klariga laboro de s-anino Dafinka Ilieva, akŭŝistino en la hospitalo, la kurson partoprenas multaj kuracistoj kaj flegistinoj. Bonegan ekzemplon de akurateco donas la ĉefkuracistino.

La kurson gvidas s-anino Lilija Sotirova — instruantino de fremdaj lingvoj en supera lernejo.

P. Stojkov

III INTERNACIA MEDICINA ESPERANTO-KONFERENCO

15—19 DE JULIO 1981, RUSE, BULGARIO

Je 15—19 de julio 1981 en la bela ĉedanuba urbo Ruse okazos la III Internacia Medicina Esperanto-Konferenco (IMEK).

Temoj de la konferenco:

1. Zorgoj pri la ĉirkaŭa medio.
2. La internacia lingvo Esperanto kaj la progreso de la medicino.
3. Liberaj komunikoj.

Resumojn de la proponataj prelegoj oni povas sendi ĝis la 25. II. 1981. Ĉiu prelego (kun eventuale diapositivaj) devas daŭri 10—12 minutojn.

La konferenco okazas en la jaro, kiam la bulgara popolo celebras solene la 1300-jaran jubileon de la bulgara ŝtato. Lige kun tio la konferencanoj ekskursos al la antikvaj bulgaraj ĉefurboj Pliska kaj Veliko Tŭrnovo. En ambaŭ lokoj okazos prelegoj pri la koncernaj periodoj el la historio de la bulgara ŝtato kaj la sanprotekto en tiu tempo.

En IMEK povas partopreni esperantistoj-sanlaboristoj (kuracistoj, flegistinoj, stomatologoj, apotekistoj, veterinarmedicinistoj k. a. el Bulgario kaj eksterlando).

Pliajn informojn oni povas ricevi de: 1) Distrikta Estraro de Bulgara Esperantista Asocio, str. 9 septemvri 98, 7002 Ruse, Bulgario, aŭ 2) Sofio, p. k. 66, Bulgara Esperantista Asocio, Medicina sekcio, Bulgario.

OFICIALA KOMUNIKO DE LA AKADEMIO DE ESPERANTO

Oktobro, 1980

La Akademio de Esperanto notas kun forta malaprobo diversajn propojn, inter si malsimilajn, ŝanĝi aŭ modifi la ortografion de Esperanto.

La Akademio konstatas, ke neniuj ortografia ŝanĝo estas necesa, aŭ dezirinda, aŭ en ligo kun modernaj presmaŝinoj aŭ komputmaŝinoj, por kiuj ĝia ortografio estas tiel same oportuna kiel la ortografioj de aliaj lingvoj, aŭ pro ia ajn alia motivo.

La ortografio de Esperanto estas integra parto de la historio kaj kulturo de tiu lingvo kaj konformiĝas perfekte al la karaktero de la lingvo. Iu ajn ortografia ŝanĝo nur kompromitus la lingvon kaj ties tradicion.

Pro tio la Akademio de Esperanto konfirmas, ke la sola alfabeto de Esperanto estas tiu de la Fundamenta Gramatiko, al kiu aldoniĝas samloke jena rimarko: „Presejoj, kiuj ne posedas la literojn ĉ ĝ ĥ ĵ ŝ ŭ, povas anstataŭ ili uzi ch, gh, hh, jh, sh, u“.

Prezidanto: W. AULD

Sekretario: D-ro A. GOODHEIR

SALUTLETERO DE ZAMENHOF

En la gazeto „*Esperanto*“, januaro 1905, n-ro 1—2, estas presita salutletero de L. Zamenhof adresita al Ilja Davidoviĉ Ostrovski, rusa esperantisto.

ne datita

Kun ĝojo mi salutas la unuan rusan gazeton dediĉita al la afero de la lingvo internacia Esperanto. Tiu ĉi gazeto aperis malfrue, tre malfrue... Sed pli bone malfrue, ol neniam.

La lingvo Esperanto naskiĝis en Rusujo kaj la unuaj lernolibroj kaj vortaroj estis eldonitaj en la lingvo rusa; tial ne estas mireble, ke ankaŭ la unuaj amikoj de tiu ĉi lingvo estis rusujanoj. En la unua serio de la esperantistoj, eldonita en la jaro 1889, inter 1000 adresoj oni apenaŭ trovis kelkajn dekojn da adresoj eksterlandaj, — ĉiuj estis el Rusujo.

Oni devis tial antaŭvidi, ke ankaŭ esperanta gazeto aperos en Rusujo. Sed kvankam la aŭtoro de Esperanto komencis klopodi pri tio ĉi jam en la jaro 1888, liaj penadoj ne havis sukceson. Pro diversaj kaŭzoj ne sole gazeto ne povis eliradi, sed ankaŭ la disvastigado mem de la lingvo Esperanto estis ligita sur ĉiu paŝo kun grandaj malfacilaĵoj. Kaj se malgraŭ ĉiuj malfacilaĵoj la afero de la lingvo ne pereis tuj en la komenco, tio venis nur de tio, ke la aŭtoro de la lingvo tiam estis ankoraŭ juna kaj havis ankoraŭ sufiĉe da energio, por ne perdi la kuraĝon kaj batali kontraŭ la malfacilaĵoj.

Tamen pli aŭ malpli frue tiu ĉi energio

devis elĉerpiĝi. La materiala situacio de la aŭtoro jam de longe estis tre malbona kaj, kiam en la jaro 1895 al la sola esperanta gazeto (kiu eliradis en Nurnbergo) en unu bela tago estis fermita la enirado Rusujon, kie ĝi havis pli ol duonon de siaj abonantoj, tiam ĉe la aŭtoro falis la manoj.

Sed feliĉe al tiu tempo la afero de la lingvo Esperanto jam sukcesis fortiĝi en eksterlando. Jen tie, jen aliloke komencis aperadi varmegaj laborantoj, kaj iom post iom la tuta pezocentro de la esperanta afero translokiĝis eksterlanden (precipe Francujon). Kaj en Rusujo pro diversaj malfacilaĵoj la afero komencis ĉiam pli kaj pli fali.

Nun, kiam en eksterlando eliras pli ol dudek esperantaj gazetoj, aperis fine ankaŭ la unua esperanta gazeto en Rusujo. Estas domage, ke ĝi aperis tiel malfrue, sed — ni ripetas — pli bone malfrue ol neniam. Nun, kiam en eksterlando la afero esperanta faras grandegajn paŝojn antaŭen, ni esperu, ke ĝi ankaŭ en Rusujo reviviĝos kaj la nunaj rusaj esperantistoj jam ne devos bataladi kun tiaj malfacilaĵoj, kun kiuj devis bataladi la unuaj pioniroj

L. ZAMENHOF

ESPERANTO PERAS

Ci-jare mi estis feliĉa partopreni la 65an UK de E-o en Stokholmo. Dum la kongresaj tagoj mi renkontiĝis kun multaj el miaj eksterlandaj geamikoj, havis novajn konatigojn. Aparte interesa estis mia konatigo kun la franca familio Jeanne kaj Jac Fircaz. Ili rakontis al mi pri la francino s-ino Josson, kiu en 1939 j. grave helpis la bulgaron Stefan Kocev el u. Lovec, suferantan en koncentrejo en Gurs (Francio).

En julio ĉi-jare s-ino Josson vizitis nian landon invitive de k-do Kocev. Li renkontis ŝin ĉe la ŝtallimo. Multe da civitanoj de Lovec renkontis la karan gastinon, ĉiuj brakumis ŝin, invitis ŝin al siaj hejmoj. Ankaŭ en Presjaka, la naskiĝvilaĝo de k-do Kocev, ĉiuj loĝantoj eliris por renkonti s-inon Josson. Post ŝia reveno en Francion ŝi rakontis en la redakcio de j. „*Sud-Orient*“ pri sia gastado en Bulgario. En la ĵurnalo aperis artikolo kun foto de s-ino Josson, k-do Kocev kaj lia nepineto. En j. „*Zarja na Komunizma*“ (Lovec) oni publikigis resumon de la artikolo.

Bojana Prodanova

URĜA!

LETERVESPERON organizas la kursgvidanto Marin Bačev por siaj du E-kursoj por komencantoj (aĝo: 15—65) la 1-an de februaro 1981 j.

Bonvolu sendi salutkartojn por propaganda celo kaj korespondpropojn. Respondo certa. Ĉiu ricevos belan dankkarton.

Adreso de la kursgvidanto: 1000 Sofio, p. k. 1054, Marin Bačev.

LA ESPERANTO-PAGO DE J. „ZARJA“

La E-movado en Bulgario ĉiam staris sur la pozicioj de humanismo, paco kaj amikeco inter la popoloj. Kaj tio tute ne estas hazarda. La e-istoj en la tuta mondo estas inspirataj de la deziro pri reciprokaj kontaktoj. Ili batalas por mondo sen militoj kaj sangoversoj, kontraŭ la imperiismo kaj faŝismo. Per la lingvo E-o ili batalas por proksimigo inter la homoj surbaze de reciproka estimo kaj paca interkomprenigo.

Pro sia humanisma kaj pacama karaktero la bulgara E-movado estis rigardata ĉiam malfavore de la faŝisma potenco. Tiu ĉi persekutis ĝiajn agantojn kaj organizaĵojn, malhelpis la lernadon de E-o, rigardis kun suspekto la organizatajn kursojn kaj antaŭ la fino de sia regado tute malpermesis ĉian E-agadon.

La monarkofaŝisma potenco apa-

lara, legeja, kooperativa, virina k.a., inkluzive de la Esperanta, ĝi farigis ŝatata kaj serĉata de la honesta popolo inteligentulo kaj la laboramasoj. Malgraŭ la persekutoj fare de la monarkofaŝisma potenco kaj la severece de la polica cenzuro, la ĵurnalo sukcesis transformi en tribunon de la kontraŭfaŝisma batalo kaj de la gvidataj de Bulgara Komunista Partio amasorganizaĵoj.

Unu el la plej regulaj kaj plej bone redaktataj pagoj de j. „Zarja“ estis ĝuste la E-pago. En la daŭro de kelkaj jaroj ĝi ĉiusemajne aperis kaj tenis viglajn la adeptojn de la Internacia Lingvo, spegulis ilian laboron en la organizado de kursoj, direktis ilin al subtenado kaj fortigado de la internaciaj ligoj, subtenis ilian batalon por paco — kontraŭ la preparata de la imperiistoj nova mondmilito.

Post silento de ĉ. ses monato en „Zarja“ aperis la dua numero de la E-pago (4912/15.01.1938) kun titolo kompostita per grandaj preslertoj „Esperanto“ kaj subtitolo „La internacia Lingvo ĉe ni“. Ĉi numero denove komenciĝas per artikolo de Asen Grigorov sub titolo „Nia tasko“. En ĝi estas dirite: „Esperanto ne devas resti nur celo, oni ne devas kontentigi per tio — nur lerni ĝin, sed tuj kaj ĉiufanke uzi ĝin por internaciaj ligoj kun niaj eksterlandaj kunbatalantoj por paco, kulturo kaj tuthomara feliĉo“.

Plue la aŭtoro rekomendas al kooperativanoj, abstinulocietaj kaj aliaj agantoj „plekti densan kaj fortikan reton de internacia amikeco kaj solidareco, uzante por tiu ĉi nobla celo Esperanton — sendubne ilon de paco, kulturo kaj homfeliĉo“.

IV СТР. АНТОН

ЕСПЕРАНТО

Zarja, ciutaga informa ĵurnalo, LXVI № 5165
12 XL 1938, Sofia, Bulg., bnl
Dondukov 84 Esperanto-pago 66

МЕЖДУНАРОДНИЯТЪ ЕЗИКЪ У НАСЪ И ПО СВЪТА

rte akiris siajn reprezalojn dum la dua duono de la 30aj jaroj ĝis la fino de 1944. En 1936j. la polica cenzuro ĉesigis 17 periodaĵojn kun progresema karaktero, nuligis ĉiun eblecon pri lega agado. Nome dum tiuj ĉi jaroj, realigante en la praktiko la direktivojn de Georgi Dimitrov pri amasigo de la kontraŭfaŝisma batalo per kreo de Popola kaj poste de Patrolanda Fronto, la Bulgara Komunista Partio, de ĉiuj rekonita organizanto de la kontraŭfaŝisma batalo, povis certigi ankoraŭ unu tribunon de tiu batalo — la ĉiutagan ĉefurban ĵurnalon „Zarja“. Ĝi estis privata eldono, propraĵo de Akcia Societo „Unuigitaj Bulgaraj Presejoj“ kun ĉefa akciulo Atanas Damjanov. Tamen ĝi frunte kun sia ĉefredaktoro Krástju Stanev, malgraŭ kelkaj deflankigoj, trudita de la politikaj cirkonstancoj, transformiĝis en ĵurnalon, kiu, laŭ la vortoj de k-dino Cola Dragojeva, „sukcesis akiri popularcon inter la komunistoj, la popolamasoj kaj la tuta intelektularo“.

Saĝe kaj lerte, atentante ĉiujn eblecojn de la Ezopa lingvo, redaktoroj kaj kunlaborantoj de j. „Zarja“ dum kelkaj jaroj elektivigadis la partian linion pri unuigo de la popolamasoj sur vasta kontraŭfaŝisma bazo. Tiunmaniere per la enkondukita en „Zarja“ pagoj — kultura, junu-

Unufoje la Esperanto-pago de „Zarja“ aperis en n-ro 4784 je la 14 de aŭgusto 1937 kun artikolo de la konata partia kaj E-aganto Asen Grigorov sub titolo „Kio estas Esperanto“. En sia artikolo la aŭtoro parolis pri la apero, esenco kaj taskoj de la internacia lingvo, substrekis ĝian signifon por proksimigo de homoj el la diversaj partoj de la mondo je la nomo de paco kaj amikeco inter la popoloj. En la sama artikolo la aŭtoro sin apogas sur la tradicioj de la bulgara E-movado kaj direktas la legantojn de la ĵurnalo al aktiva lernado de E-o. Karakteriza por la unua pago, kio daŭras ankaŭ en la ceteraj pagoj, estas la regula aperado de rubriko „Esperanto-novajtoj“, kiu pleniĝis per riĉaj informoj pri la vivo de la internacia E-movado, samkiel pri la organizitaj kursoj kaj aliaj aranĝoj en nia lando.

KARAJ LEGANTOJ,

KIEL VI OPINIAS?
ĈU NIA E-MOVADO
NE BEZONAS NUNĴIAN
E-PAĜON EN IU CEN-
TRA ĴURNALO?

En la sama numero oni kome n cas vastan enketon inter la legantoj de la ĵurnalo sub titolo „Kial mi farigis esperantisto“. La respondoj aperas en la sekvantaj numeroj de la E-pago.

En n-ro 4918 de 1938 j. la kunlaboranto de la pago Ivan Krestanov sub titolo „La mirinda ŝlosilo, kiu malfermas ĉies korojn“ aperigas raportojn pri sia vizito en Norda Svedujo kaj pri siaj internaciaj ligoj efektivitaj pere de E-o. Estas ankaŭ raportajetoj pri E-agado en Kazanlâk, Sevlievo, Cirpan, Kneja ka.

Dum preskaŭ kvin jaroj ekde la apero de la unua E-pago ĝis la fino de 1943 j. ĝi karakterizigas per obstina efektivigo de la ĉefaj taskoj, starigitaj jam en la unuaj pagoj: instigo al lernado de la lingvo, subteno de organizitaj ligoj kun la amikoj de E-o en la lando pere de direktivaj artikoloj malgraŭ la renkontataj malhelpoj kaj malfacilaĵoj, regula informado pri E-manifestaĵoj enlande kaj eksterlande. Tiusece ĉi pago, konekse kun la Lenin-indiko, pro la manko de ebleco subteni organizajn ligojn transformiĝis en organizanton de la progresema bulgara E-movado.

Kiel regulaj kunlaborantoj en tiuj jaroj oni povas citi Asen Grigorov, Ivan Saperov, Violin Oljanov, Boris Golemanov, Aleksandro Dunčev, Ivan Krestanov, K.

KONATAJO KAJ NEKONATAJO PRI NOVJARFESTAJ KUTIMOJ

La novjaraj amuzvesperoj estas malnovpokaĵoj festoj.

Antaŭlonge la homoj notis la ekeston de novjaro konforme al la naturfenomenoj — la ŝanĝo de la jarsezonoj, la suna rondiro, la lunfazo, la migrado de la birdoj kaj, kompreneble, konforme al la legoj de siaj religioj.

Dum la unua jarcento de la nova erao — en la epoko de Julio Cezaro — oni kreis la tiel nomatan julian kalendaron. Ekde tiam la 1-an de januaro oni konsideris komenco de la nova jaro. Sed ĉe nun multaj popoloj de Azio kaj Afriko festas la novjaron je diversaj datoj de la jaro. Nur la navigistoj, vojaĝantaj al Aŭstralio, ne povas festi la novjaran feston, ĉar, ekveturante je la 31a de decembro, dum unu nokto ili trapasas la internacian limon de la tempo kaj matene, kiam ili eniras Aŭstralion, tie jam estas la dua de januaro.

La antikvaj kristanoj estis konvinkitaj, ke la festado de novjaro estas idolana kutimo, pro tio ili ne festis ĝin. En 692 j. la sinodo de Konstantinopolo ĉe turniĝis kun alvoko al la kristanoj ne partopreni tiujn solenaĵojn. Ĝis la IX jc. la kristanoj en iuj landoj festis novjaron je la 25-a de marto — la tago de „la elaketo de la pekoj“.

Je la 1-a de septembro 1699 en Rusio oni intencis, kiel ordinare, renkonti la venontan 7208 jaron ekde la kreigo de la mondo, kiam la informantoj de Petro I anoncis, ke estonte la 1-a de septembro estigis ordinara tago kaj la nova 1700 jaro estos festata je la 1-a de januaro. Meznokte je la 31a de decembro Petro I, ĉirkaŭita de siaj korteganoj, portantaj malgrandajn abiojn, mem malfermis la novjaran feston. Tiel en Rusio komenciĝis nova tradicio — interŝanĝi gratulojn lige kun la festo, kaj ĉiu devis ornamati sian domon per abio.

Estas sciata, ke la abio aperis unue en Germanio dum la mezepoko. La malnovaj germanoj kredis,



[Vivuĝoj kaj gajeco ŝprucas de tiuj bulgarinoj novjare vestitaj]

ke en ĝi loĝas la fantomoj de la arbaro, kiuj gardas ĉiujn kreskaĵojn kaj protektas la sovaĝbestojn kaj birdojn. Al abioj ofte proksimiĝadis la severaj gentogvidantoj de militantaj triboj por mildigi la potencon spiriton kaj ricevi ĝian favoron.

La tradicio ornamati la abiojn per donacoj, ludiloj kaj sukeraĵoj ankaŭ devenas el Germanio. La abio estas enkondukita kiel novjara laboro en tutan Eŭropon kaj nordan Amerikon. Sed en latin-amrikaj landoj oni anstataŭigis ĝin per palma laboro ornamita per kotono.

Ce ni en Bulgario la abio venis pere de Rusio. En la liberigitaj el otomana jugo urboj kaj vilaĝoj la rusaj soldatoj kaj administrantoj aranĝis kristnaskajn abioarbitojn por ĝojigi la loĝantaron. Tiu gaja kutimo baldaŭ estigis popola. Nuntempe multaj el la kristnaskaj kutimoj transformiĝis en novjarajn, pliriĉigante sian signifon.

Avo Frostoj aperis antaŭ du mil jaroj. Tiam en la ritaj festotagoj la loĝantoj de la Nordo jetadis sur la sojlojn de siaj domoj bakitajn bulketojn, pecetojn da viando, elverŝadis glason da vino por

mildigi la Frostojn — ke ĝi ne kverelu, ne malhelpu la ĉasadon kaj ne neniigu la semitaĵojn.

Generala fenomeno por ĉiuj popoloj estas renkonti la novjaron kun salutpaŝoj kaj sonorado. La homoj kredis, ke la bruo forpelas la malbonajn spiritojn kaj venigas la bonajn.

Unufoje la konfetojn oni uzis en 1887 j. La direktoro de la fama varieteo „Kazino de Pari“ en Parizo ekdeziris variigi la novjaran feston. En la kulmino de la amuzado la homoj estis superŝutitaj per malgrandaj diverskoloraj globetoj. Sed ne tute taŭga estis la ŝerco, ĉar la globetoj estis el gipso. Pli malfrue aperis la malgrandaj diverskoloraj paperaj konfetoj, kiuj ĝis nun gajigas balojn kaj karnavalojn.

Originate en Francio kaj Svislando laŭ tradicio ĝuste je la 24a horo oni malfermas botelon da ĉampano. Post la Unua Mondmilito tiu ĉi kutimo disvastiĝis en la ceteraj eŭropaj landoj.

Krom tiuj ĉi ĉi popolo havas siajn specifajn novjarajn kutimojn.

El la bulgara: Nadeŝda Geneva

Kolinkov, V. Rozev, Ĥr. Marinov—Gorov, Trifon Ĥristovski k.a. — la plejmulto agantoj de la Komunista Partio kaj la Laborista Junulara Unuiĝo (RMS).

Krom novaĵoj, artikoloj kaj raportoj pri internaciaj vojaĝoj oni povas noti ankaŭ materiaĵojn, en kiuj la aŭtoroj substrekas la ligojn inter E-o kaj la junularaj progresemaj movadoj — abstinula, turista, kooperativa, la popolaraj

legejoj k.a., substrekante la grandan signifon de E-o, donanta al tiuj organizaĵoj eblecon krei internaciajn ligojn kaj kontaktojn je la nomo de amikeco kaj frateco inter la popoloj kaj paco en la mondo.

Ĉio ĉi parolas pri bona, korekta gvidado de la E-paĝo de j. „Zarja“ en la spirito de la direktivoj de G. Dimitrov pri aktivigo de la kontraŭfaŝisma batalo sur pli vasta tutpopola bazo, pri apliko de la

legalaj eblecoj de ĝia disvastigo en ĉiuj popoltavoloj.

La kontraŭfaŝisma kaj progresema karaktero de la E-paĝo de j. „Zarja“, ekzistinta dum la plej pezaj jaroj de la monarkofaŝisma diktaturo en nia lando, estis senduba sukceso de la bulgaraj e-istoj. Malgraŭ la kruela boto de la reakcio kaj la persekutado de apartaj E-agantoj la paĝo transformiĝis en tribunon de la nobla kaj humanisma bulgara E-movado.

AKAD. PETRO DINEKOV — VERKISTO, SCIENCISTO, MONDLINGVANO

La akademiano profesoro Petro Dinekov, Popola Aganto de la Kulturo, estas unu el la plej elstaraj figuroj — eble la plej elstara — de la bulgara literatura scienco. Aŭtoro de pluraj studoj, eseoj, portretoj de verkistoj, esploroj sur etnografiaj materialoj kaj pritraktoj de kulturhistoriaj problemoj, li ludas unuarangan rolon en la nuntempa universitata kaj akademika vivo de Bulgario. Estas malfacile ne nur analizi, sed simple elnombrigi la varian problemaron de lia ampleksa verkaro — precipe scienca kaj publicista.

Dinekov estas vaste konata nomo ĉe la sciencistaj rondoj ne nur en Bulgario, sed ankaŭ en eksterlando. Li reprezentis la bulgaran literaturan kaj folkloran sciencon en pluraj internaciaj kongresoj, konferencoj, seminarioj, simpozioj, en pluraj eksterlandaj universitatoj, institutoj kaj akademioj, kie li distingigis per brilaj prelegoj kaj lekcioj.

Ekde studentaj jaroj li direktis sian intereson al la filologiaj studoj kaj al la literatura scienco. Kaj la literatura scienco lin kondukis al la folkloro. Tia estis kvazaŭ la sciencista kariero de preskaŭ ĉiuj elstaraj profesoroj en la filologia fakultato de nia universitato: Ivan Siŝmanov, Mihail Arnaudov, Stojan Romanski, kc. Eble pro tio, ke ĉe la folkloro la literaturaj fenomenoj estas objektive observeblaj en sia plej simpla kaj plej karakteriza formo, la plimulto el la literaturaj sciencistoj kaj historiistoj pasiĝas pri la artaj kreaĵoj de la ordinarnaj homoj kaj de la vastaj popolamasoj. Ankaŭ Dinekov ne faris escepton: li jam difinitive kaj senrevene adoptis la fakon de folkloristo.

Petro Nikolov Dinekov naskiĝis la 17-an de oktobro 1910 en Sofio, en familio de ŝtatoŭstoj. Li faris brilajn studojn en la historia-filologia fakultato de la Sofia Universitato kaj ricevis stipendion por sekvi siajn specialajn studojn pri slavistiko ĉe la Universitato de Varsovio. Post la fino de sia specializado li estis nomita docento kaj poste — profesoro en la katedro pri bulgara lingvo kaj literaturo en la Sofia Universitato. En 1967 li estis elektita membro de la Bulgara Akademio de Sciencoj kaj ekde 1973 — direktoro de ĝia Instituto de Folkloro, kies fondinto li estas.

Pro sia nobla karaktero, sindona dediĉo al la scienco, pedagogia talento kaj precipe pro sia vasta erudicio Dinekov fariĝis plej ŝatata profesoro de siaj studentoj. Sub



lia gvidado kaj sub liaj zorgoj kreskis granda nombro de junaj kulturagantoj. Plejado da universitataj kaj gimnaziaj profesoroj, docentoj, doktoroj, elstaraj bulgaraj scienclaboristoj kaj verkistoj estas liaj entuziasmitaj disĉiploj.

Dinekov distingigis precipe per siaj literaturaj eseoj kaj krilikaj studoj. Li pentris trafajn skizojn de pluraj bulgaraj poetoj kaj beletristoj: Stefan L. Kostov, Jordan Jovkov, Nikolaj Rajnov, Emanuil Popdimitrov k. a. En 1956 aperis lia libro „Literaturaj portretoj“, en

Petro Dinekov

A M O

Mi en bruo perdis min.
Tra l'popolamaso sola
vagi, vagi mi sen fia' —
kaj la vivo brue bolis,
krude ĝi turmentis min.
En mallumo jen lampir'
brilis tra ŝtonoza vojo
kaj ekiris mi — martir' —
al sufero, al malĝojo,
de la lumo kavalir'.

Mia koro jam heligis.
Ĝi ne movas plu dolor'.
Ĉar en ĝi jam translokiĝis
la konsola vorto amo —
difinita de la sorto
resti por lacega kor'
amikin' ĉama.

Kiam batas mia koro en turment',
kaj doloras troe la anim' —
tiam kaptas min karese nova sent',
kaj silente ĝojas, ĝojas mi sen lim'.

El „Bulgara Esperantisto“
n-ro 8/1926 j.

kiu li faras tre sukcesajn karakterizojn de novbulgaraj verkistoj. Krome li estas aŭtoro de gravaj esploroj pri la origino de la bulgara literaturo, pri la malnovaj bulgaraj verkistoj, poetoj kaj beletristoj el la epoko de nia nacia renesanco; li kunlaboras en la plej gravaj revuoj kaj gazetoj, redaktas la revuon „Bulgara Folkloro“, organo de la Instituto pri Folkloro. Samtempe li faras prelegojn por la studentoj de la Sofia Universitato.

Inter liaj pli fruaj verkoj ni citu: „Sofio dum la XIX jc. ĝis la liberigo de Bulgario“ (1937), „Sofiaj verkistoj dum la XVI jc. Parto unua: Popo Pejo (1939)“, „Kuzman A. Sapkarev, kolektanto de folklor materialo“ (1940), „Malnovbulgara literaturo“ (1950), „Literaturaj portretoj“ (1956), „Verkistoj kaj verkoj“ (1958), „Verkoj de la (bulgara) renesanco“ (1962), „Literaturaj problemoj“ (1963), „Folkloro kaj literaturo“ (1968), „El la historio de la bulgara literaturo“ (1969), „Inter siauloj kaj fremduloj“ (1969), „Inter la folkloro kaj la literaturo“ (1978) k.a.

La plej grava kaj plej ampleksa verko de akad. Dinekov estas lia studo titolita „Bulgara folkloro“ (parto unua, Sofio, 1959, 588 paĝoj; dua eldono 1972). Kiel la aŭtoro mem deklaras en sia antaŭparolo, „Tiu ĉi verko celas montri la belecon kaj la riĉecon de la bulgara popola poezio“. Ĝian kernon konsistigas liaj prelegoj antaŭ la studentoj de la Sofia Universitato. Fakte ĝia enhavo estas multe pli vasta kaj ĝia celo — pli ĝenerala: respondi al la kreskanta intereso de la vastaj popolamasoj pri la problemoj de la bulgara folkloro. Inter la ĝeneralaj problemoj, kiujn pritraktas la aŭtoro en la enkonduko de la unua parto, estas tiuj pri la esenco kaj la signifo de la folkloro, pri ĝia rolo kiel faktoro de la nacia kulturo. Liaj ŝatataj temoj estas: la rilato inter folkloro kaj literaturo, la genezo kaj la evoluo de la folkloraj verkoj, la klasifiko de la popolkantoj, la metriko de la bulgara popola poezio k.a.

Fine ni ne povas prislenti la cirkonstancon, ke akad. Petro Dinekov estas aktivulo en la Esperanto-movado. Li lernis la internacian lingvon en sia juna aĝo (ĉirkaŭ 1925) kiel gimnaziano, kaj vigle eklaboris por ĝia kreskado kaj disvastigo. En 1926 li jam verkis originalajn poeziajn en Esperanto, kiujn li publikigis en la organo de BEA: „Nokte“ (1926), „Amo“ (1926), tradukis la rakonton

LA MONDO DE JORDAN JOVKOV

Akad. Petro Dinekov

Jordan Jovkov estas verkisto-humanisto. Lia rilato al la mondo kaj la homoj formigas dum la jaroj antaŭ la Balkana Milito (1912 j.), kiam li loĝas inter vilaĝoj (unue en sia naskiĝvilaĝo, ĉirkaŭna en la sinjoroj de Balkan-montaro, poste kiel instruisto en la vilaĝoj de ebena Dobruĝa). Grandegan signifon ĉi tie havas la medio, la observoj de la verkisto, lia profunda penetro en la vivon de la vilaĝano, la alproprigo de ĉio plej bona el la moralaj tradicioj de la popolo. Lia senpera ĉiutaga kontakto kun la homoj vastigas lian moralan horizonton, akriĝas lian etikan sentemon, riĝas lian estetikan mondon. Ĉi tie aperas ankaŭ la rolo de la popola poezia verkaro.

Sed la radikoj de la arto mondo de Jovkov oni devas serĉi ankaŭ en la literaturaj tradicioj. Li lernis antaŭ ĉio de niaj naciaj literatur-tradicioj — de Botev kaj Vazov, de Penko Slavejov kaj Elin Pelin. Al ili ni devas aldoni ankaŭ la artan sperton de la granda rusa literaturo. Aparte parencaj al li estis Tolstoj kaj Turgenjev, Ĉeĥov kaj Gorkij — kiel per sia granda literatura afero, tiel ankaŭ per sia humanismo.

Sed kiam ni parolas pri la humanismo de Jovkov, ni ne devas forgesi, ke li devenas el medio, ludinta gravan rolon en la disvolvigo de nia socio — tio estas la popola instruistaro.

La milito estas la unua etapo en la krea vojo de Jovkov — nome per siaj militrakontoj li firmigas sian nomon de talenta verkisto. La milito tuj starigis lin vizago kontraŭ vizago kun la sorto de la popolo, kun la animo de la homo, kun la gran-

daj problemoj de la vivo kaj la morto. Li partoprenas la militon kiel batalanto sur la fronto mem kaj travivas ĝin senpere ekde la unua tago (temas pri la Balkana Milito). Jovkov pentras la heroismon de la aparta persono kaj de la amasoj, priglora la bravecon, la konscion pri deo, la pretecon por memfido. Sed kune kun tio oni devas substreki, ke en la milito li vidas antaŭ ĉio la homojn el la popolo, la ordinarajn soldatojn, la homojn de la vilaĝa laboro, metitajn en novan situacion, sed kun la samaj, neŝanĝitaj sentoj, streboj, ĝojoj kaj malĝojoj, profunde ligitaj kun la tero kaj la laboro. Kaj ankoraŭ io: la verkisto ne prisilentas, ke la milito estas tre komplika afero, ne nur heroeca epopeo, sed miksaĵo el heroismo kaj morto, el detruo kaj krueleco. Ne levigante ĝis klara kaj malkaŝa senmaskigo de la milito, Jovkov vidas la terurajn bildojn de la soldatsuferoj, la holeron, la popolan malfeliĉon, la protestojn kontraŭ la nenigo de homoj.

Gravan lokon en la verkaro de Jovkov okupas la legendoriĉa mondo de Ĵeravna, pentrita kun admirinda artoforto en „Balkan-montaraj legendoj“. Tio estas mondo de pasinteco, sed pasinteco, en kiu ĉeestas multaj el la plej bonaj trajtoj de la bulgara nacia karaktero. Jovkov kreas ciklon de verkoj kun tutnacia signifo, levas sian naskiĝlokon ĝis simbolo de nia nacia historio. En tiu ĉi libro la ŝatataj herooj de la verkisto estas plej ofte junaj kaj belaj homoj, samtempe bravaj kaj severaj; ili ne konas hezitojn, decidojn prenas rapide kaj sekvas ilin obstine kaj neflankigante. Iliaj sentoj estas elementaj kaj fortaj, ili rompas la ordinarajn

vivonormojn, la tradiciajn moralajn leĝojn, venkas la naturplagojn, la peston, eĉ la morton. Tiaj estas ne nur la viroj, sed ankaŭ la virinoj.

Sed Jovkov ne vivas nur en la mondo de la pasinteco; lia atento estas altirita antaŭ ĉio de lia nuntempo. Lia humanismo tamen manifestigas ne en la solvomaniero de la grandaj sociaj problemoj, kiujn li tuŝas, sed en la prezentomaniero de la virtoj, sentoj kaj suferoj de la ordinaraj homoj, homoj el vilaĝoj kaj malgrandaj urboj de Dobruĝa — tia, kiam li ĝin konas ekde la jaroj antaŭ la Unua Mondmilito.

Malfacile oni povas ĉirkaŭrigardi la tutan riĉecon de figuroj kaj bildoj, pri kiuj Jovkov rakontas: familiaj rilatoj, malsanoj, laboro, peza zorgo pri vivtenado, laboro sur la kampo kaj en la metiista laborejo, personaj sentoj kaj enlogiĝoj, gajaj okazaĵoj kaj ŝercoj, oftaj renkontiĝoj de la vivo kun la morto. Al tiuj temoj li dediĉis multege da rakontoj, la novelon „La rikoltisto“ kaj la romanon „La bieno apud la landlimo“.

Aparte riĉa estas lia galerio de virinaj figuroj. La virino kaj la amo estas unu el la ŝatataj temoj de Jovkov. La verkisto pentras la ĉarmon, kiun elradias la virino, la rolon, kiun ŝia ĉarmo ludas en la sorto de la viro. Tiu ĉi ĉarmo estas ligita kun la problemoj pri la beleco, kiu en la verkaro de Jovkov estas levita al kulto. Oni eĉ ne povus elnombrigi la nomojn de belaj virinoj en lia verkaro: jen Rada, Pauna, Ranka, Jenda, Tiha, Kurta, Dojna, Dimana kaj dekoj da aliaj en la rakontokolekto „Balkanmontaraj legendoj“, jen Cvetana, Maria, Sakire, Albena, Anička, Asie, Antica, Nona,

„Fajro-lango“ de Nikolaj Rajnov, (1940), recenzis la ĵus aperintan libron „Elektitaj rakontoj“ de Jordan Jovkov (1939).

De 1931 j. Dinekov estis ĉefredaktoro de la revuo „Balkana Konkordo“, kie en la rubriko „Literatura observo“ li publikigis en E-o serion da literaturaj studoj pri bulgaraj verkistoj: Ivan D. Siŝmanov, Veliko Jordanov, Stefan L. Kostov, Jordan Jovkov, Nikolaj Fol, la poetoj Emanuel Popdimitrov, Nikolaj Rajnov k. a. Aparte interesa estas lia artikolo „Polaj verkistoj en Esperanto“, aperinta en la revuo „Nuntempa Bulgario“ (1958). Tie li analizas la tradukon de la poemo „Sinjoro Tadeo“, la biografion de Mickiewicz,

verkitan ed Jastrum, kaj la libron de la pola moderna poeto Julian Tuwim „Versaĵoj polaj kaj tradukitaj“ (en Esperanton de la aŭtoro mem, Sf. G.)

Akad. Dinekov havas la ĉefan meriton por la enkonduko de Esperanto en la studplanon de la Sofia Universitato (1963 j.). Kiel profesoro pri literaturo en la filologia fakultato kaj membro de la akademio konsilantaro li faris formalan proponon pri tio kaj energie pledis por ĝi. Kelkaj aliaj membroj de la konsilantaro aligis al la propono (akad. Vl. Georgiev, prof. Ivan Lekov k. a.) kaj ĝi estis akceptita. Tio ĉi estis grava evento en la historio de la E-movado en Bulgario kaj la e-istoj devas memori ĝian iniciatinton. La instruado de

E-o en la Universitato daŭras jam 17 jarojn.

En la kadro de la Somera E-Universitato dum la 48a Universala Kongreso de E-o en Sofio prof. Dinekov faris tre interesan prelegon en la internacia lingvo pri la kreskado kaj evoluo de la bulgara nacia literaturo.

Eĉ nun, malgraŭ sia eksterordinara profesia okupateco kiel universitata profesoro, scienca laboristo, verkisto, redaktoro kaj direktoro de instituto, akad. Dinekov ne preterlasas okazon disponi sian aŭtoritaton kaj sian kompetentecon al la E-movado. Tial la bulgaraj e-istoj kun granda estimo kaj rekono notas la sepdekajn datrevenojn de lia naskiĝo kaj bondeziras al li sanon, feliĉon kaj longan vivon.

MALAMIKOJ

Okazis tiel, ke kiam Ĥristo Mesečka eniris la Gastejon de Antimovo, tie estis neniu, kaj li, anstataŭ sidigi, ekstaris ĉe la pordo kaj komencis fari al si cigaredon. Sarandovica, la juna, skribanta ion en sia kajerego, ekrigardis lin por momento, ekridis kaj diris:

— Bonan venon, avo Ĥristo! Kio nova?

— La novo estas, ke la turka sultano turkiĝis. Ĉio estas en ordo, nur ĉe la senbarbulo lipharoj ne kreskos kaj ĉe la favulo hararo.

Sarandovica turnis al li sian vizaĝon, ekrigardis lin per siaj nigraj okuloj kaj denove ekridis:

— He, avo Ĥristo, ĉiam vi ŝerce parolas. Ion alian diru, alian. Ja vi ĉirkaŭas tra la vilaĝoj, ĉion vi scias.

— Nu, tiam ankaŭ ion alian mi diru al vi: hieraŭ ŝarnenanoj kaj bistricanoj* apenaŭ ne mortigis unuj la aliajn. Granda batalo okazis. Kverelas ili pro terposedaĵoj, kaj tiu kverelo estas pli maljuna kaj ol mi, kaj ol mia patro. Hazarde mi preterpasis kaj vidis ilin. Estis ekirintaj feraj plugiloj kaj el la

unua, kaj el la alia vilaĝo—kvazaŭ artilerio Ankaŭ sur ĉevaloj galopis kelkaj—ĝuste kiel dum milito. Malantaŭe marŝis piedirantoj kaj kriadis, ŝajne tio estis turka edziĝfestoj. Mi haltigis la ĉevalon kaj rigardis. Atinginte la limŝtonon...

— Sed kial ili kverelas?



Bojana kaj multege da aliaj en lia cetera verkaro.

Ne nur ĉe la virino tamen, sed en ĉio, kio ĉirkaŭas la homon, Jovkov serĉas la belecon—en objektoj, bestoj, naturo. Ĉe li tio estas kontentigo de la soifo pri beleco en la mondo de malĝojo kaj doloro, de malbela kaj maljusto. En lia verkaro abundas figuroj, ŝprucantaj belon, junon, forton kaj bravecon. Sed la spirita beleco manifestiĝas ankaŭ aliloke—en la multnombra grupo de maljunaj homoj, de kontempluloj kaj revantoj, tra kies okuloj la verkisto rigardas kaj pritaksas la mondon. Ilia forto estas en la riĉa vivosperto, en la kapablo penetri profunde en aĵojn kaj eventojn kaj kompreni la homan animon, en ilian soifon pri bonfaro. Tia estas ekzemple Sali Jaŝar, la forĝisto kaj veturilisto, kiu tiel faras la ĉevalveturilojn, ke ili „kantas“ survoje. Jovkov estas konvinkita, ke en la vivo agas profundaj moralaj fortoj, ke la homa animo posedas la kapablon pri moralaj renaskiĝoj. Unu el la plej imponaj ekzemploj tiudirekte estas la sorto de Inĝe—timiga estro de kargaloj*, ĉe kiu ĉio estas neordinara—la eksteraĵo kaj la beleco, la forto kaj la braveco, la interna potenco, jungita en detruado. Jovkov kun la forto de granda pentristo mon-

tras, kiel post la abrupta animskuiĝo tiu ĉi interna potenco transformiĝas en noblan kaj profunde homan konstrulaboron: Inĝe fariĝas defendanto de la sklavigita bulgara loĝantaro. La problemo pri la moralaj renaskiĝoj estas idea bazo de multaj rakontoj de Jovkov.

La verkisto klopodas prezenti la plej bonajn trajtojn de nia popolo, montri ĝian moralan esencon. Nemultaj el la bulgaraj verkistoj sukcesis kun tia interna ĝojo montri, kiel la homoj el la popolo amas, kiel ili revas kaj entuziasmiĝas, kun kia profunda koncentriĝo ili kontemplas la vivon kaj la naturon, kun kia tremo akceptas la miraklon de la beleco, kun kia profunda kompato rilatas al la homa malfeliĉo, kiel ili sopiras pri justo kaj bono. Ege interesa tiurilate estas la rakonto „Valkadin parolas kun dio“. La milito alportas al la maljuna vilaĝano Valkadin multnombrajn malfeliĉojn, ĝi detruas lian familion, sensencigas lian vivon. Kiel enkorpiĝo de la homa maljusto Valkadin staras ĉe la landlimo kiu dividis patron disde la filo kaj fraton disde la frato. Kaj en la sendormaj noktoj tra lia animo viciĝas turmentaj pensoj aj demandoj:

„Kiu estas tiuj, kiuj juĝas super la homoj kaj decidas la mondaferojn, kiu donas al ili forton, ĉu ili havas dion? Ĉu ili ne estas naskitaj de patroj kaj ĉu ili ne mortos kiel ĉiuj homoj? Kiel oni povas fiksi la ŝtatlimon

kien ajn, hazarde, lasi la tombojn en unu ŝtato kaj en alia la proksimumojn de la mortintoj? Vi ekiras por vidi sian fraton aŭ sian filon vidi—kaj renkontas vin fremda soldato... direktas sian fusilon kaj ponardon kaj krias: „Malantaŭen!“ En sia domo esti—kaj esti pelata. Kial tio eblas, dio mia, kial?...“

Kiu jetas fraton kontraŭ fraton kaj filon kontraŭ patron? Kial la bono foretiras, kaj la malbono triumfas... La tero naskas tiom, kiom naskis antaŭe—kial estas nudaj kaj nudpiedaj?...“

En la sintetika figuro de Valkadin la verkisto provis enkorpiĝi la soifon de la homoj el la popolo pri bono kaj justeco. La vortoj de Valkadin, direktitaj al dio, estas ne nur dolorkrio, ne nur drameca demando, sed profunda protesto kontraŭ la maljusto en unu neprudente ordigita mondo.

La demokratia bazo de la verkaro de Jovkov estas en tio, ke li pentras la homojn el la popolo kiel portantojn de la beleco de la homo kaj la vivo, kiel esprimantojn de la popola humanismo. En tio konsistas la senlima kredo de la verkisto je la fortoj de la popolo, je ĝia estonteco. Per tiuj belegaj trajtoj de homfiguroj el la popolo Jordan Jovkov ligigas kun la plej bonaj, la plej demokratiaj reprezentantoj de la bulgara literaturo—de Botev kaj Vazov ĝis Vapcarov kaj la plej elstaraj kreantoj de nia nuntempa arto.

* Kargalo—ano de rabista taĉmento en la otomana imperio dum 18—19 jc.

— Pro tero, pro peco da agrokampo. Kaj se oni dirus, ke ĝi estas granda — tute ne, ĝi estas tiel malgranda, ke se azeno ruliĝos tra ĝi, ĝia vosto restus ekstere. Sed homa spito — nek unuj, nek aliaj ĝin cedas, tial ili alveturigis ankaŭ plugilojn. Kaj haltis mi por rigardi. Atinginte la limŝtonon, kelkaj el ambaŭ flankoj antaŭeniris kaj ekstaris unuj kontraŭ la aliaj kiel kokoj — kverelegas. Kaj jen el la malantaŭo iuj ekkriis „hu-u-ul“, el la kontraŭa flanko aliaj same „hu-u-ul“, kaj interpuŝiĝis — nekompreneble kiu kiun batas. Ludas la bastonegoj — kvazaŭ pirojn oni frapfaligas.

— Dio mia! Eble ili mortigis unuj la aliajn!

— Ne, nenio. Ĉar se inter cent homoj la duono estas frenezaj, la cetera duono estas prudentaj. Tiuj enmiksiĝis kaj trankviligis ilin. Sed tamen rompitaĵoj kapoj kaj manoj estas. Nun — al la juĝisto.

— Ili plenigos la poŝojn de la advokatoj.

— Vi lasu ĉi tion, Vasilka, sed se estas io, donu al mi manĝeti, ĉar malsata urso ne dancas.

Sarandovica movetis siajn maldikajn brovojn kaj nur per kapo donis signon — ne estas.

— Ne estas! Kaj vi igas min rakonti novaĵojn, ha? Bona afero! He, alia estis via patrino, dio ŝin absolvu kaj eternan pacon al ŝi en loko herboriĉa kaj trankvila. Kia virino ŝi estis — el la terfundo ion trovos, sed nutros vin. Se nenio alia estas — argilpoto da fazeolo bolos ĉe la fajrujo. Kaj vi — ne estas. Se mi malsatas, kiel mi povus trinki vian acidan vinon!

Meseĉka koleriĝis kaj eniris internen.

— Bonan venon! — lin salutis Kalmuk.

— Bonan venon! Pli bone diru al mi bonan vojon, ĉar mi foriras. Tio ĉi ne estas gastejo.

— Aŭdu, he samnomulo, — diris Kalmuk, — kiomjara vi estas? Delonge mi deziras demandi vin. Mi estis juna kaj maljuniĝis, sed vi... vi ĉiam restas la sama. Kiomjara, nu?

Meseĉka ne respondis. Sed Kalmuk ĝuste parolis — neniu povis diri, kiomjara estas Meseĉka. Li estis iom malalta, malforteta homo, kun tute blankaj haroj, kun bluhelaj okuloj kaj mallonge tonditaj lipharoj. Lia kaŝtankolora sakpantalono estis eluzita, sed tre pura; sur la maleoloj li havis altajn lanajn surŝtrumpojn, kiajn neniu jam vestis. Meseĉka estis komercisto, tamen pli ĝuste dirite li ne komercis, sed rikoltis post la veraj komercistoj — aĉetis tion, kio restis: iun malgrasan bruton, iun difektitan felon. Sed plej ŝatis aĉeti ion vendatan pro bezono. Ekflamas la kapo de iu malriĉulo — kaj jen Meseĉka ekflaras kaj venas kiel aglo al kadavro.

Kalmuk ne ĝisatendis la respondon, eĉ forgesinte pri kio li demandis. Sed Meseĉka ankoraŭ silentis pro kolerigo kaj rigardis tra la fenestro. „Mi devas manĝeti ion, — li pensis, — ne eblas tiel!“ Kaj ĝuste kiam li intencis turniĝi al Sarandovica kaj demandi

pete, antaŭ la gastejo ekbruis kelkaj veturiloj. El ili malsupreniĝis deko da vilaĝanoj, inter kiuj du kun bandagiĝitaj kapoj.

— Jen bistricanoj, — diris al si Meseĉka, — iras al la juĝisto. Jen ankaŭ la vunditoj.

Bistricanoj eniris, daŭrigante la interparoladon, komencitan jam survoje:

— Ni ĉion rakontos al li, — parolis avo Ivan Titev. — Ni rakontos, kaj li, la advokato, scias, kion fari. Ĉi, Nedjo, kaj ĉi, Ivan, tuj post nia alveno en la urbon iros al doktoro, por ke li esploru viajn kapojn kaj donu al vi atestilon. Rabistoj, veraj rabistoj, honton ili ne havas! Ursuloj! Instruos ni ilin, nur iom da tempo...

— Ĉu kontraŭ tiuj el Sárneno vi procesos? — aŭdigis sin Meseĉka.

— Kontraŭ ili, jes, senrifuze! Proceson, ĝis kiam eĉ niaj ĉapoj falos de la kapoj. Ankaŭ al niaj infanoj ni testamentos procesi! Ĉu tio estas homoj? Rabistoj!

— Kion vi povas atendi de homoj, kiuj en la arbaro loĝas! — aŭdigis sin alia. — Donu al ili nur kapojn bredi kaj per sakfajfiloj ludi, ja sakfajfilon nur el kaprofelo oni povas fari.

— Tion al ili donu: sakfajfilon kaj luktadon.

Sidiĝinte ĉirkaŭ du longaj tabloj, bistricanoj vicigis buntajn dorsosakojn kaj el ili eltiris ĉion ajn: ruĝetajn ŝvelintajn panbulojn, fromaĝon, salitan lardon. Kelkaj malligis borderstriaĵojn viŝtukojn kaj el ili montrigis boligitaj kokinoj kaj po unu lignoskatoletoj da salo.

Meseĉka ekrigardis tiun mangajaĵon kaj liaj okuloj restis sur la tablo. Subite tiuj ruzaj bluokuloj ekfulmetis kaj li, ekstarinte kontraŭ la bistricanoj, ekkriis:

— Vere vi parolas, avo Ivan! Tiaj estas ili, sárnenanoj — simplaj homoj. Kaj se temas pri iliaj sakfajfiloj — pri ili mi rakontu!

Bistricanoj ekaŭskultis.

— Foje, — komencis Meseĉka, — sárnenanoj veturis al Silistra por salo. Aĉetis ili salon, ŝargis la veturilojn kaj returnen. Sed atinginte la Rokegon — vi scias, kia arbaro tie estas, — sárnenanoj haltis kaj eljungis la ĉevalojn, por ke ili komencu paŝti sin. Eniris ili la arbaron ŝajne por tranĉi por si vergetojn, sed trovis tie aceron kaj komencis fari fajfilojn. Faras ili fajfilojn, elprovas ilin — la arbaro eĉas pro la fajlado. Ekpluvas, la salo komencas flui, sed kiu pensu pri tio — la fajfiloj fajfas tra la arbaro. Kiam finfine ili venis al la veturiloj — kion vidi: sub ĉiu veturilo marĉeto, kaj la salo — eĉ ne spuro de ĝi restis!

Bistricanoj ekkridis. Ekkridis ankaŭ tiuj du kun la bandagiĝitaj kapoj. Kaj ĉar la ridigaĵojn ili plene sentis iom poste, la rido ripetigis pli laŭta kaj pli gaja.

— Estu viva kaj sana, Ĥristo! — kriis avo Ivan Titev kun okuloj larmantaj pro rido. — Fajfiloj — kaj la salo fluidiĝis... Ha-ha-ha! Dankon pro via parolo, ŝaga homo.

Nu, Hristo, aŭdu — eblas, ke vi estas malsata, venu do kaj prenu de nia pano. Ha tiel, bonan apetiton! Donu, filino**, glason ankaŭ por via avo Hristo!

Bistricanoj mangis kaj trinkis, kun ili mangis ankaŭ Mesečka. Sed pro rapidado ili ligis la dorsosakojn, ridis ankoraŭ iom pri la fajfiloj kaj forveturis al la urbo.

Kiel multaj maljunaj homoj Hristo Mesečka havis la kutimon paroli al si mem, kaj kiam bistricanoj jam estis for, li diris al si voĉe:

— Hristo, bone vi manĝetis! Bone vi manĝetis, Hristo, ĉu ne?

Ne pasis multa tempo, kaj aliaj veturiloj haltis antaŭ la gastejo: estis sarnenanoj. Oni tuj rekonis ilin pro la fortaj, gorgaj voĉoj. Ili ŝajne ne parolis, sed kverelis inter si. Eniris altstaturaj viroj kun grandaj ĉapo surkape, lipharaĵoj, nerazitaj. Sed ĉio, kion ili havis sur si, estis nova — ruĝaj vatitaj jakoj, sakpantalonoj el solida kamloto, neĝblankaj lanaj piedtukoj. Ili siavice insultis la bistricanojn. Kaj kvankam Mesečka estis konata al la enirintoj, ili, incititaj de sia malamo al bistricanoj, rigardis ankaŭ lin kiel malamikon.

— Bravuloj, vi malfruis! — diris mole Mesečka. — Se vi nur iomete estus rapidintaj, vi trafus tie ĉi bistricanojn kun avo Ivan Titev.

— Ĉu ili estis tie ĉi?

— Jes ja. Sed sentinte, ke vi venas, ili malaperis.

Sarnenanoj ekridis. Ankaŭ ili kiel la bistricanoj eliris dorsosakojn, pli grandajn, kaj komencis mangi.

— Maldikuloj estas tiuj bistricanoj, — komencis Mesečka. — Vestas sin en pantalonon, ŝajne ardaĵpreniloj sin vestas, kaj al la agrokampo iras en platŝuoj. Kaj timemaj ili estas. Kiam en ilian vilaĝon venas urso, ĉiuj ekkuŝas, por ke ĝi surpaŝu ilin kontraŭ timo. Kaj ĉu vi scias pro kio?

Sarnenanoj streĉis la orelojn.

— Mi rakontu al vi. Foje ciganoj alkondukis urson, enhejmiĝis por noktumi kaj ligis la urson. Sed la urso — ja sovaĝbesto ĝi estas — sukcesis malligi sin, ektrenis la ĉenon kaj forkuris. Tamen kie kaŝi sin — jen tie, jen ĉi tie, fine en la kokinejo de Vasil la Konsulo, vi konas lin, ĉu ne?

— Jes, ni konas lin. Poste?

— Ekkriaĉis la kokinoj, kaj la Konsulo diris: „Certe vulpo!“ Iris li kaj fermis la kokinejon. Dum Vasiledzino alportadis kandelon, la Konsulo vidis, ke la vivajo elinterne komencas puŝi la pordon, tial li apogis ĝin per dorso. „Ha, edzino mia, diris li, ĉi tio estas io granda, eble la porkego de nia baptopatro!“ Etendis Vasiledzino la kandelon — kaj kion vidi: urso! Ek al la domo! Ili iŝlosis sin kaj kriegas: „Urso!“ De najbaro al najbaro — la tuta

vilaĝo kriadis „Urso!“ ĝis la mateno. Kaj la urso implikiĝis pro sia ĉeno en la kokinejo kaj sidas tie. Eksaltis tiam bistricanoj — deziras mortigi la ciganon. Dek ormonerojn prenis de li por unu kokino, sufokita de la urso. Ne pro tio, ke ĝi kostas tiom, sed pro la timo, kiun ili suferis dum la nokto!

Mesečka ankoraŭ ne estis fininta, kaj sarnenanoj ekfleksiĝis pro ridego; kiam li finis, ili kvazaŭ ne ridis, sed hurlis kiel lupoj.

— Vivu, Hristo! Cent jarojn vivu! — kriegis la plej aĝa vilaĝano. — Hej, diablo vin prenu, vi igos min morti pro rido. Nu, venu, venu manĝeti de nia pano. . .

— Mi jam manĝetis, — diris Mesečka, kaj ĉar Sarandovica ridis, li ekrigardis al ŝi kaj okulsignis, — do mi ne estas malsata, sed se vi regalus, mi trinkus iom da vineto.

— Filino, donu al li duonokaon*** da vino!

Oni mendis vinon ankaŭ por Kalmuk. Se aliaj estus en la drinkejo, oni ankaŭ ilin regalus. Kalmuk levis la glason. Ne atentinte dum la tuta tempo, kion oni parolas, li diris:

— Je via sano, karaj gastoj! Ĉu sarnenanoj? Mortaĉu tiuj ursuloj!

Li trinkis, lekpurigis la buŝon kaj komencis ĉirkaŭrigardi, kvazaŭ dirinte ion tre interesan. Bone, ke la vilaĝanoj ne atentis lin. Sed iu sin aŭdigis:

— Kio estas? Kion parolaĉas ĉi tiu?

— Ebria li estas jam, — respondis Mesečka, — mem ne scias, kion li parolas.

Kalmuk komprenis sian eraron, mordis la barbon kaj eksilentis.

Sarnenanoj starigis por ekiri. La maljuna, kiu kondukis ilin, kuntiris la brovojn kaj diris: „Tuj post nia alveno ĉi, Keran, iros al la doktoro por montri al li la manon, kaj ĉi, Stojko, montros, kie ĉi estas trapikita. Diru, ke unu ripo estas rompita.“

Ankaŭ ili forveturis per siaj veturiloj, kiuj estis ĝuste por homoj kiel ili — tegitaj per ŝero, pezaj kiel kanonoj, kun impetaj, grasaj ĉevaloj.

Mesečka restis sola, ridetadis kaj ion babilis al si. Kalmuk lasis sian benkon, iris al li kaj diris:

— Nu, kio okazis, samnomulo mia? Kial tiuj ĉi homoj tiel koleras?

— He, Kalmuk, Kalmuk, — rediris Mesečka, — vi kvazaŭ el tombo eliras. Ja mi diris ĝin jam — kaj mangis, kaj trinkis. Kial vi apenaŭ nun demandas?

La juna Sarandovica ridadis.

El la bulgara: Kunco VÁLEV

* Sarnenanoj — loĝantoj de vilaĝo Sarneno, bistricanoj — de v. Bistrica.

** Filino — popola adresvorto de maljunulo al juna virino.

*** Okao — malnova pezunuo, egala al 1282 gramoj.

Mi loĝis kiel instruisto en Maroko (Kazablanka), kiam en 1930 mi eklernis E-on en koresponda kurso. Post 2-4 monatoj mi, helpata ofte de vortaro, kapablis skribi, korespondi. Tial mi presigis anoncon en „Internaciisto“, ĵurnalo, kiu estis presata, se mi ne eraras, en Leipzig (Germanio). La titolo estas nun reutiligata simile de k-do F. Haiderer en Aŭstrio. Li publikigas tre legindajn broŝurojn. Ĉu vi konas ilin? Se ne, mi povas sendi ilin al vi. Ne ĝenu vin. Do en Maroko oni tute nelege cenzuris miajn korespondaĵojn (la polico) kaj, kompreneble, akuzis min pri... komunismo. Tial mi estis alvokita de la instruistaro. Mi bone defendis min, atakante la cenzuristojn kaj minacante per severa interveno en la Pariza deputitejo per Paul Vaillant Couturier (Pol. Vajan Kutjurie), Kachin (Kaŝen) ktp. Mi konfesis, ke mi iom blufis... Sed tiuj sinjoroj, bonege salajrataj, timis pli ol ĉio publikadon en Francio pri la koloniaj skandaloj. Pro tio ili ne kuragis persekuti min... Do, ĉiam atako pli efikas ol defendo! Tamen mi luis en brita poŝtoŝeĉo leterkeston celante tiel prudentecon. Do mia anonco alportis al mi en la angla firmo la unuan tagon 14 leterojn! Ĉiuj, plejparte, alvenis el Germanujo. Dum du monatoj preskaŭ ĉiutage mi ricevis dekojn da korespondantoj el diversaj landoj. Ĉar mi estis aldoninta „respondo garantiita, kaj... ĉar mi ĉiam fidele parolon tenas. Do, mi aĉetis amason da poŝtkartoj por respondi plej ofte: „Pro tio da korespondantoj ne eblas al mi korespondi kun ĉiuj... bedaŭrinde...“ Tiel sendube min kontaktis Trifon Ĥristovski. Mi aparte memoras, ke dum la hispana civila milito mi sendis al li la tiam famekonatan esperantlingvan gazeton „Popola Fronto“, eldonatan en Hispanio de du gravaj kamaradoj — Louis Hernandez, nun forpasinta post longa restado en la faŝistaj karceroj, kaj Vilhelmo Bosch (Boŝ), kiu sukcesis resti en Francio kaj estis helpata de Marsel Bubu (mortinta en Buhenvald), kaj de mi, kiu tuthazarde eskapis el la ungoj de gestapo tra Pireneoj, tra densaj arbaroj, „makizo“-taĉmento... ĝis 1945.

Do mi ne plu povis korespondi tiam! Eĉ mia edzino, pro timo, bruligis multajn valorajn dokumentojn, inter alie ĉiujn miajn esperantaĵojn. Tiel mi perdis la adreson de mia bulgara amiko. Vere, gestapo venis en mian hejmon, sed la „birdoj“ estis forflugintaj dumnokte en nekonata direkto. Mi ne povas rakonti al vi detale pri niaj luktoj ĉu kontraŭ gestapo kaj germanaj soldatoj, ĉu kontraŭ francaj policistoj de la faŝista registaro de l'ama marŝalo Petin (Petén). Multaj el niaj partizanoj estiĝis viktimoj de tiuj malegalaj luktoj — FTP konsistis el komunistoj, plej ofte francoj, sed ankaŭ fremdlandanoj (precipe hispanoj). Veraj internaciaj soldatoj! La armiloj estis paraŝutataj post la alveno de Anglio, sed, kompreneble, tiuj sinjoroj malamis nin... kaj netute intencis paraŝutigi armilojn al ni!!! Krom armiloj ili paraŝutis monon, diversvalorajn aferojn (vestaĵojn, nutraĵojn, tabakon ktp.), sed precipe al siaj burĝaj amikoj.

La socialdemokratoj! Tiuj lastaj ne ŝatis la armilojn. Ili kaŝis ilin subtere. Ofte la armiloj estis kapataj de la malamiko. Sed kiam la ŝanco helpis nin, ni malkovris la armilojn kaj plezurege kunportis ilin. Vera venko por ni, kiuj havis ofte nur mizerajn germanajn pafilojn de la milito 1914-18,

kaj ofte la kugloj estis rapide elĉerpataj. En simila momentoj ni posedis nur... balailotenojn! Tial kiam ni kaptis militilojn kanadajn kaj anglajn, ni zorge purigis ilin! Ofte ankaŭ la germanaj mortigitoj „donacis“ al ni pafilojn.

Do tiam mi ne sciis, ke en Bulgario Trifon Ĥristovski faris similan laboron al la mia... 35 jarojn poste vi sciigas al mi tion! Neniam vizaĝe mi konis Trifon. Li pereis por Bulgario liberigita el kapitalisma tiraneco kiel multe da sovetianoj, kiuj pereigis Hitleron je la kosto de sia vivo... Nun pro la sovetaj armistruoj en Afganistano la lupoj kune kun muzikestro Karter per ĉiuj gazetoj, televidoj, radioj blekegas kontraŭ Sovetio! Terure! Kiam la usonanoj bombetris Vjetnamion dum jaroj, tiuj ĝesinoroj, se ne aplaudis, almenaŭ malkuraĝe silentis. Hodiaŭ ili rabis... La dolaroj amerikaj, kompreneble, povas ĉion aĉeti — gazetojn kaj gazetistojn, kiuj predikas usonfavore kaj kaptas multajn senkapulojn, naŭvulojn sen kritikspirito! Tiel la ŝafaro estas kondukata al la buĉejo... sen rezistado! CIA, kiu komplotis en Pakistano por kapti Afganiston, certe pli malproksimen flipantis: ribeligi la muzulmanajn sovetajn respublikojn landlime de Afganistano. „La fera kalkanumo“ volas ĉion regi, ekspluati la tutan mondon! En ĉiuj militoj ili agis same... Unue, vendi armilojn kaj varojn al la nacioj en milito kaj tiel suĉi ties oron. Poste, due, kiam milito finiĝas, ili armile intervenas. Preskaŭ sen multaj viktimoj ili estras la pakkontrakton tute venke. Tiel ili faris en la du lastaj militoj. La metodo estis tre profita por tiuj sinjoroj! Nun pro la aktuala ekonomia krizo ili tre ofte devas pripensi novan militon, kiu solvus denove la problemon kiel antaŭe laŭ ilia monprofito. Ekzemple, bataligi Sovetion ĉu kontraŭ perflida Ĉinio, ĉu kontraŭ okcidentaj kapitalismaj landoj... Ili vendus la militmaŝinojn al tiuj, kiuj donus siajn... brustojn. Sed hodiaŭ ne tute similas al hieraŭ! Pli komplikita estas la atomafero — oni povas cindrigi la Babilon-amerikajn urbojn. Do ankaŭ CIA devas ruze boardi, zigzagiri, sen perdi la celon, kiu datumas de 1918 j. — nenigi Sovetion, retriunigi en la tuta mondo la fian ekspluatadon de homo fare de homo, de la laborista klaso fare de la kapitalista klaso — la triumfo de la dolaro, de la „fera kalkanumo“, antaŭvidita kaj senmaskigita de la fama verkisto Ĝek London. Ĉu vi legis tiun ĉefverkon? Jes, la vojo al vera socialismo estas zigzaga kiel montara vojeto — ofte ĝi postulas siniferojn, sangon, la plej noblan, kiel tiu de via heroo Trifon, kiun mi havis la honoron renkonti momenton sur nia esperantista komuna vojo. Se li havis tombon, tagon, plezurigu min, se vi povas, surmeti je mia nomo kelkajn rozojn ruĝajn... Mi antaŭdankas vin! Ni estis du batalantoj por sama ideo — unu en Bulgario, alia en Francio. Samtempe via frata gesto sin direktos al ĉiuj martiroj tutmondaj de la justa batalo por homarlibero kontraŭ la tirana kapitalista jugo.

Vian landon mi nepre devis viziti kaj mi vizitis ĝin dum la Varna-kongreso en 1978. Neniam mi forgesos, kiel tute neatendite ni renkontis unu la alian! Rapide mi relegis mian leteron. Bonvolu senkulpi miajn erarojn kaj mian stilon malkorektan, malrican... Mi ja estas 78-jara kaj tio tute ne helpas la homon!

Frate via: Jean Lezan

* Metodi Garev el Sofio.

La ŝtata Soveto de PR Bulgario honoris per ordeno „Ruĝa Standardo de la Laboro“ k-don DIMITRO HAĜIEV, prezidanto de la bulgara sekcio de MEM kaj membro de nia redakta komitato, lige kun lia 60-jariĝo kaj pro aktiva partopreno en la socialisma konstruado.

„Kiel trarompi la sorĉitan cirkon“ estas temo, pri kiu e-istoj skribas ofte en diversaj gazetartikoloj laŭ teoria vidpunkto, sed neniu montras praktikan recepton, kiel solvi tiun ĉi problemon. Kaj la senkonsila esperantistaro apenaŭ scias, kiel utiligi tiajn teoriajn konsilojn. Sed tamen antaŭ nelonge aperis unu pli valora instigartikolo, kies ĉefa konsilo estis: ni bombardu per leteroj diversajn organizaĵojn, instituciojn, entreprenojn, ni informu ilin pri realaj faktoj rilate la utiligeblecon de unusola internacia lingvo E-o. Jes, tio estas bona instigo, sed ĝi enhavas unu mankon: ne donas instruon al la esperantistaro, kiajn faktojn uzi tiucele, ĉar la e-istoj mem apenaŭ kapablas konvene sumigi la necesajn faktojn.

La dua trafa instigo aperis en „Heroldo de Esperanto“, n-ro 15/1979, en la dua parto de la artikolo „Ĉu la loka grupo estas eksmoda?“ de B. Golden, pli precize en la fina ĉapitro „Verda kurteno“, kie la aŭtoro konsilas: „Ni ne atendu, ke la homoj, kolektivoj, organizaĵoj venos al ni, male, ni iru kun E-o al ili, ni proponadu la uzon de E-o por ilia utilo.“

Mi ankaŭ opinias, ke tia ideo estas realigebla kaj realigenda. Tiu ĉi ideo ekfrapetis min antaŭ preskaŭ du jaroj, kaj mi rikoltis jam la unuajn fruktojn de tia aktiveco.

Unue, mi ĝemelis du laborkolektivojn de infaninstruistoj el Voronjeŝ (USSR) kaj el mia loĝloko. Ili akceptis favore mian proponon pri tradukon de iliaj kolektivaj leteroj pri interŝanĝo de edukspertoj. La ĉefaj instruistoj akceptis la Internacian Lingvon tiucele, kvankam ili naŭ jarojn lernis la rusan lingvon en lernejo. Tamen ili ne regas ĝin almenaŭ por flua korespondado. Kaj tiel komenciĝis la internacia amikeco de du diversnaciaj laborkolektivoj pere de E-o.

Duan ĝemeligon mi sukcesis establi inter laborkolektivo de miaj konatoj-ministoj el brigado de socialisma laboro „Ruĝa Kruco“ kaj hungarminista laborkolektivo „13a Koŝuta brigado de socialisma laboro“. Jam antaŭ unu jaro komenciĝis la unuaj korespondkontaktoj. Por la hungaraj brigadanoj tradukadis anoj de la E-klubo en Oroszlány (la loĝloko de la ministoj). Ĉe la fino de septembro 1979 realigis la unua internacia renkontiĝo de sesmembra delegacio de ĉefaj ministoj kun la tuta kolektivo de la hungara brigado en urbo Oroszlány. La ĉefa delegacio havis min kiel e-istan interpretiston, kaj la hungara kolektivo havis du interpretistojn. Kvankam ni restis ĉe la hungaraj ministoj nur du tagojn kaj tri noktoj, inter ĉiuj anoj de la renkon-

tigo ekregis reciprokaj simpatioj kaj amikeca etoso, malgraŭ ke ne ĉiuj ĉiun komprenis.

Jes, en tiu ĉi kazo mi konkludis, ke ne stas realigebla instrui E-on al ĉiuj plenkreskuloj, sed estas realigebla veki intereson pri internaciaj interkolektivaj amikeckontaktoj kun perspektivo pri reciprokaj vizitoj (multaj homoj ja posedas aŭtomobilojn kaj ŝatas viziti najbarajn landojn). Dum tiaj internaciaj vizitoj pli kaj pli multe da homoj ekkonsciigos pri la mankoj de la ekzistanta instrusistemo de mondlingvoj en la bazaj lernejoj. Pli-malpli frue

TIA IDEO ESTAS REALIGEBLA

ni povos igi ilin ankaŭ simpatiantoj subskribi leteron al respondecata ŝtata institucio, per kiu oni povus postuli enkondukon de la pli facila Internacia Lingvo en la instrusistemon de la lernejoj. El tiaj leteroj oni devas substreki la deziron de tiuj socitavoloj kontakti kun alilandanoj, kaj samtempe substreki, ke tiuj homoj — ordinaraĵoj, oficistoj, laboristoj ks. — mem ne havis kaj ne havas la eblecon ellerni iun el la mondlingvoj en lernejo aŭ ekster lernejo. Oni devas ankaŭ substreki la neperfektecon de la instruado de naciaj lingvoj en la lernejoj, kie nacia lingvon kapablas ellerni perfekte nur tiuj homoj, kiuj scias, ke ili bezonas ĝin por siaj profesiaj celoj, taskoj.

Jes, kvankam la infanoj ne estas maturaj, tamen ili jam estas sufiĉe sagacaj kaj scias distingi, laŭ siaj emoj, kion ili volas fari. Precepte tial fiaskas la multhora instruado de fremdaj lingvoj en la lernejoj.

Por „trarompi la sorĉitan cirkon“ ni serĉu eblecojn pri ĝemeliĝo de laborkolektivoj aŭ hobio-kolektivoj el nia ĉirkaŭaĵo. Alilandaj E-rondetoj, kluboj aŭ unuopuloj certe, almenaŭ en socialismaj landoj, volonte faros la samon ĉe si. Tiel oni altiros al kunlaboro por plifirmigo kaj disvastigo de internaciaj amikecaj kontaktoj ankaŭ homojn inter tiuj tavoloj de laboruloj, kiuj ankoraŭ ne trovis kuragon tiucele, ne sciante kiel facile kaj rapide po-

vas tion realigi la e-istoj. De tia societila aktiveco pere de la esperantistaro ankaŭ la E-movado komencos rikolti agnoskojn de la politikaj estraroj.

La dua ebleco por trarompi la sorĉitan cirkon estas kolekti subskribojn sub informletero inter homoj simpatiantaj al la ideo de Internacia Lingvo, ĉar tiuj homoj estas pli multnombraj ol la e-istoj. Tia letero enhavu unuecan informaron pri la urĝeco kaj utileco de la instruado de E-o, sed ĉiulanda E-asocio ĝin kompilu laŭ propraj enlandaj cirkonstancoj; sed pleje gravas, ke tiuj ĉi leteroj kun subskriboj estu transdonitaj aŭ forsenditaj tutlande ĉirkaŭ sama dato al ĉiuj instruistaroj — distriktoj, departementoj, tutŝtataj. Nur tiamaniere „bombardado“ donos rezultojn.

Se antaŭ kelkaj jaroj la esperantistaro sukcesis kolekti centmilojn da subskriboj sub la Stokholma Paca Alvoko, certe ankaŭ nun ĝi trovos komprenon inter la plej vastaj popoltavoloj, kiuj prosperte jam bone konas la tutan aferon.

La landaj E-asocioj interkonsiliĝu pri sama dato de tia aktiveco. Ili organizu tiun kampanjon ĉiujare, denove kaj denove, por ke instrugvidantoj sentu, ke ne esperantistaro rekomendas la Internacian Lingvon, sed ankaŭ ĉiaj laboruloj, sentantaj siajn neperfektajn sciojn de mondlingvoj.

La prezidanto kaj la estraro de UEA senlace strebas sialoke atingi progreson por uzado de E-o en UN kaj UNESCO. Ni ne esperu, ke pro iliaj rezultoj ni rajtas ne streĉi niajn cerbojn kaj nur babiladi pri bagatelajoj dum niaj renkontiĝoj. Ni streĉu niajn cerbojn por plej sukcese subteni nian E-estraron, ni agu persiste kaj la sorĉita cirklo trarompiĝos. Kiam — tio dependas plejparte de nia aktiveco, dependas unuflanke de ni mem.

TROJAN, Vojtech

str. B. Nemcova 364/B
452 01 Zlín, ĈSSR

En 1981 j. la e-istoj el Krasnodar organizas ekspozicion, dediĉitan al la 1300-jariĝo de la Bulgara Ŝtato. Ni petas la bulgarajn amikojn helpi al ni per diversspecaj materialoj por ekspozicio — libroj, revuoj, afiŝoj, insignoj, flagetoj ka. Ĉiu sendinto estos rekompencita per memordonaco.

Nia adreso: SU — 350000 KRASNODAR, ab. ja. 18, Esperanto-organizo, Sergej Kocarj.

PARADOKSA KAJ EGE MALUTILA KUTIMO



TABAKFUMADON ТЮТЮНОПУШЕНЕ
AŬ SANON — ИЛИ ЗДРАВЕ-
ELEKTU MEM АЗБЕРЕТЕ САМИ

La tabakfumado estas unu el la plej gravaj problemoj de la sanprotektado en nia epoko. Kiel en la tuta mondo, tiel ankaŭ ĉi ni, nun la plej granda parto de la fumantoj konsistas el junuloj, knabinoj kaj virinoj. Laŭ statistikoj de internaciaj ekspertoj nun en la mondo fumas ĉ. 67% de la junuloj kaj 78% de la knabinoj. Oni ne disponas pri simila bulgara statistiko, sed tre verŝajne ni proksimiĝas al la meza monda nivelo. Tute maltrankviliga stato!

La fumado de cigaredoj en Bulgario kreskas tre rapide. Laŭ internacia statistiko Bulgario estas unu el la landoj, en kiuj la cigaredfumado pligrandigas plej dinamike. Dum la lastaj 17 jaroj la kvanto de la elfumita tabako kreskis per 560% (pli ol kvin kaj duoble). Aktuale ĉi ni oni fumas cigaredojn pli ol en Italio, Jugoslavio, Greklando, Turkio. En nia okmiliona lando oni konsumas pli da tabakajoj ol en Pakistano kun ties 65-miliona loĝantaro!

Precipe seriozan maltrankvilon provokas la statistiko pri la tabakfumado inter lernantoj. Ekz. en FRG ĉiu tria lernanto, estante nur 10-12-jara, fumas. En Kanado ĉi en aĝo 8 jaroj fumas 1% de la lernantoj. Ankaŭ ĉi ni la nombro de la fumantaj lernantoj post la 10-jara aĝo plimultiĝas.

Por la disvastigo de la tabakfumado efikas du tipoj da faktoroj: socia kaj individua.

La socia faktoro estas ligita kun la ĉiam pli kaj pli kreskanta streĉeco en la ĉiutaga vivo de junaj kaj maljunaj. Ne hazarde vice kun la tabakfumado kreskas la konsumado de tiuj specoj de kafeo, kiuj entenas pli altajn dozojn da kafeino. En tio oni serĉas trankviligon, stimulojn. La eraraj ideoj, ke la tabakfumado kvazaŭ trankviligas la nervan sistemon kaj vigligas aŭ bonigas la laborkapablon, nur plifortigas la enlogigon kaj la pasiigon al la tabakfumado.

La individua faktoro havas ĉefan aspekton en la kuranta modo kaj imitado fare de la junuloj. Ili deziras simili al la fumantoj inter la plenkreskuloj aŭ al aŭtoritataj fumantaj samaguloj en sia junulara medio. Tion ili opinias esprimo de memstareco, de virigo, de supereco rilate al la nefumantoj. La imitado estas plej klare manifestata en familioj, en kiuj la gepatroj aŭ unu el ili fumas. Iliaj infanoj ordinare sekvas la ekzemplon de la gepatroj. Kontraŭe: en familioj de nefumantaj gepatroj nur 10% de la infanoj komencas fumi.

FAVORA GRUNDO POR DIVERSAJ MALSANOJ

La tabakfumado estas ligita kun enspirado de ege malutilaj kaj venenaj gasoj: nikotino, karbonoksido k. a. Ili kaŭzas favoran grundon por diversaj malsanoj de la pulmoj kaj la koro, kanceron k.a. Parto de tiuj gasoj venenigas la atmosferon en la ejoj, kie oni fumas. Tiamaniere ankaŭ la nefumantoj vole-nevole enspiras la malpuran aeron kaj fakte estiĝas pasivaj fumantoj. Ĉiu el ili ricevas la efikon de kvadrato de la fakte elfumitaj cigaredoj! Tio efikas tre serioze precipe al la infanoj, devigataj esti en la familio pasivaj fumantoj.

Grandan krimon kontraŭ sia idaro faras tiuj patroinoj, kiuj fumas dum la gravedeco aŭ dum flegado de novnaskito. Laŭ la internacia statistiko la nombro de la fumantaj gravedulinoj bedairinde kreskas konstante. En iuj landoj ties nombro atingis 43%.

Kaj jen paradokso: la medicinistoj klarigas al la estontaj patroinoj la eĝan malutilon por ilia propra kaj de la infano sanstato, do la patroinoj estas ĉi pli bone ol la viroj informitaj pri la negativaj postsekvoj de la tabakfumado en sia stato, tamen ili ne havas volon rezigni la fumadon!

Oni rajte demandas: ĉu vere estas tiel malfacile rezigni, se la scienco plej skrupule atestas la grandan malutilon de la tabakfumado por la persona, familia kaj socia sano? Kial ĉi medicinistoj fumas? Kial la nombro de fumantaj gestudentoj de medicino pli kaj pli kreskas paralele kun la semestroj?

La kaŭzo estas tre simpla: la organismo de la fumanto alkiutimigas al certa dozo da nikotino, rezulte de kio li aŭ ŝi sentas subjektive plialtigitan deziron pri tabako. Tio instigas la fumanton daŭrigi la fumadon por ne perdi tiun efikon, kiu fakte estas tute trompa. Krome, la malaltigo de la nikotindozo en la organismo provokas malagrablajn sentojn. Por forigi ilin la fumanto ree kaj ree enportas ni kotinon en sian organismon.

LA PLEJ EFIKA BATALO

Tial oni ricevas bonajn rezultojn en la kuracado de fumantoj per maĉado de medikamentoj enhavantaj minimuman dozon da nikotino. Ekzistas ekzemple bulgara preparato „Tabeks“, kiu donas en la praktiko bonajn rezultojn. La plej rekta kaj rezultodona maniero tamen restas la abrupta ĉesigo de la fumado kun provizora krizo, dum kiu la organismo malkutimigas al fumado. Mi persone observis similajn kazojn, post kiuj la ekfumantoj neniam plu interesiĝis pri cigaredoj. Tio hardigas ankaŭ la volon de la fumanto kaj edukas lin bondirekte.

Bonaj estas la rezultoj en familioj de nefumantaj gepatroj, kies ekzemplon sekvas preskaŭ ĉiuj iliaj infanoj. Tiel plej efika estas la batalo kontraŭ la disvastigo de la fumado, kiam tiu batalo komenciĝas en la familio mem. La lasta estas la plej taŭga loko por agado kontraŭ la tabakfumado.

Por limigi la fumadon kaj konservi la sanon de la nefumantoj en nia lando ekzistas diversaj administrativaj malpermesoj pri fumado en publikaj lokoj — oficejoj, laborejoj, restoracioj, kafejoj, sukeraĵejoj, en aviadiloj k.s. Al la ŝtataj oficistoj estas malpermesite fumi dum akceptado de vizitantoj, al la kuracistoj kaj al la hospitala personaro — fumi en la poliklinikoj, hospitaloj, sanatorioj k. s., al la instruistoj kaj lektiistoj — antaŭ la lernantoj kaj studentoj. En la leĝo pri sanprotektado estas speciala paraĝrafo defendanta la interesojn de la nefumantoj. Aperis ordono de la ministro de publika sanprotektado, preskribanta kie oni rajtas fumi por ne malutili al la nefumantoj. Ĉar oni konstatas, ke ne ĉiuj preskriboj estas respektataj, socia devo de ĉiu civitano estas atenti pri ili la nedisciplinitajn fumantojn. Ankaŭ estas necesa publika kontrolo en la komercejoj, kie ofte oni interesiĝas precipe pri la profito el vendado de tabakajoj ol respekti la kernajn regulojn.

Ni, esperantistoj, partoprenu amase la noblan kampanjon de la Monda Sanprotektita Organizaĵo. „Tabakfumadon aŭ sanon — elektu mem!“

Nikola ALEKSIEV,
membro de la Landa Komitato
pri Sobrero en Bulgario

TRA SOVETUNIO

AKTIVECO INTER SOĈI KAJ RIMINI

Je 2-5 de novembro en urbon Soĉi venis granda grupo (68 personoj) el ĝemelurbo Rimini (Italio).

La gastoj vizitis la urbodomon, kie la vicurbestro k-do Jurij Skljacev rakontis pri la 70-jara historio de la urbo. En sia respondo la vicurbestro de Rimini s-ro Aldomario Kapellini parolis pri la amikaj rilatoj inter ambaŭ urboj. Kiel signon de amikeco li donacis al soĉianoj bronzan figuron el la tempo de Renesanco.

Estis responditaj multaj demandoj de la gastoj. Al unu el ili respondis la prezidanto de la E-klubo de Soĉi V. Bespalov. Li rakontis pri la agado de la klubo, pri ties multaj kontaktoj kaj amikaj ligoj kun ĉiuj kontinentoj de la mondo, pri multaj ĉiujaraj renkontigoj de la e-istoj de Soĉi kun alilandaj samideanoj.

Okazis amikaj sportaj bataloj inter futbala teamo „San Ĝuliana“ kaj du lokaj teamoj.

La gastoj vizitis la Arbon de Amikeco. Ĝi troviĝas en la ĝardeno de la Sciencesplora Instituto pri Montaraj Ĝardenoj kaj Florkulturado. En la jaro 1940 la polusa esploristo Otto Schmidt la unua greftis burĝonon sur la arbo, sur kiu estis branĉetoj kaj fruktoj de oranĝoj, citronoj, mandarinoj. Poste lian ekzemplon sekvis multaj aliaj vizitantoj, kaj la arbo akiris la nomon Arbo de Amikeco. Nun sur ĝi estas pli ol 500 branĉetoj greftitaj de homoj el 130 landoj. Sur ĉiu branĉo estas malgranda ŝildeto kun la nomo kaj lando de la greftinto kaj la dato de greftado. En la krono de la arbo estas ĉirkaŭ 40 specoj de citrusaj fruktoj.

Por ni aparte gravas, ke sur tiu ĉi mirinda arbo estas ankaŭ 6 greftoj de e-istoj. La unuan faris pola s-anino Adela Milevska el Krakovo. Ankaŭ en la muzeo de la arbo inter la multaj donacoj, faritaj de vizitantoj, estas modesta skatolo kun grundo el la tombo de d-ro Zamenhof. Parto de tiu ĉi grundo estis ŝutita sur la radikoj de la Arbo de Amikeco.

La reprezentantoj de Rimini ankaŭ faris memor-grefton.

En la lasta tago estis subskribita interkonsento inter la E-kluboj de Rimini kaj Soĉi pri amika kunlaboro. La interkonsento interalie enhavas jenajn paragrafojn:

— La E-klubo de Rimini kaj la E-klubo de Soĉi ĉiunmaniere kontribuos al la evoluigo kaj plifortigo de la amikaj ligoj inter la ĝemelurboj Rimini kaj Soĉi.

— Ambaŭ kluboj klopodos pri la starigo de kontaktoj inter siaj anoj sub la slogano: „Ĉiu membro de la klubo havu leteramikon en la ĝemelurbo“.

— Regule interŝanĝi novaĵojn pri la kultura vivo de niaj urboj kaj E-kluboj.

— Ĉiunmaniere propagandi la ideojn de paco kaj malstreĉeco en la mondo kaj aktive kontribui al ties efektivigo.

Vladimir Bespalov

VIGLA INSTRULABORO EN KRASNODAR

La e-istoj en Krasnodar bone organizis la novan lernojaron. Komence de septembro 400 afiŝoj kun invitoj al E-ekspozicioj kaj E-kursoj ornamis la urbon. En septembro — oktobro estis aranĝitaj: du grandaj ekspozicioj „Esperanto servas al paco“, 3 koncertoj kaj 7 prelegoj pri E-o. En tiuj aranĝoj partoprenis ĉirkaŭ 500 personoj. Al E-kursoj aliĝis 200 urbanoj.

Nun en Krasnodar funkcias 10 E-kursoj por komencantoj: en la E-klubo, la Palaco de Pioniroj, la Domo de Laboristoj de Klerigo, biblioteko, mekanika mezlernejo, agrikultura instituto, la ŝtata universitato. En la universitato E-o estas akceptita kiel oficiala studobjekto en la fakultato pri sociaj profesioj. Post du jaroj da studado la studentoj ricevas diplomon kun rajto instrui E-on. Funkcias tri stud-grupoj.

Sergej Kocarj

LA ESPERANTISTOJ CELEBRIS LA JUBILEON DE TARTU

En oktobro u. Tartu (Estonia SSR) celebris sian 950an jubileon. Ĝi estas malnova universitata urbo.

En la kafejo de la junulara domo „Soprus“ (amikeco), sub kies patronado funkcias la urba E-klubo, kolektis por celebri la jubileon e-istoj el Tallin, Pärnu, Viljandi, Tartu. Ĉeestis ankaŭ litovaj gastoj.

La estrarano A. Linnamägi faris mallongan superrigardon pri la historio de la urbo. Junaj e-istoj prezentis la miton „Naskiĝo de la rivero Emajodi“ (ĝi trafluas Tartu). Kantis ensemblo kaj solistoj de la amatorarta sekcio de la tartua klubo. Estis aranĝita kvizo pri la historia kaj nuntempa universitato.

Tiam salutis la gastoj. Je la nomo de la estona sekcio de Asocio de Sovetaj E-istoj salutvortojn diris J. Ojalo, kiu rakontis ankaŭ la historion de la E-movado en Tartu. La konata pabatalanto E. Raŭs parolis pri siaj vojaĝimpresoj el Hindujo kaj Peruo kaj montris multe da koloraj diapozitivoj.

Enn Ernits

URĜA: EKSPOZICIOJ ORGANIZOTAJ

Sevastopola Esperanto-klubo „Velo“ aranĝos komence de 1981 grandan porpacan ekspozicion subtitole: „La tuta homaro kontraŭ la minaco de nuklea milito“.

Estas petataj ĉiuj e-istoj kaj E-kluboj sendi al ni leterojn, fotojn, poŝtmarkojn, afiŝojn, artikolojn, libretojn pri eminentaj pabatalantoj (ĉe nacilingve) kaj aliajn ĉi-tamajn materialojn.

Ĉiun sendinton ni rekomencos per memoraĵoj pri Krimeo kaj Sevastopolo aŭ laŭdezire ni resendos la materialojn tute sendifektaj.

Ĉion sendu al: SU-335 000, Krimeo, Sevastopol, ĉefpoŝtefo ab/kesto 229, Esperanto-klubo.



Lige kun la glora 1300a jubileo de la bulgara ŝtato la Samarkanda E-klubo de Interpopola Amikeco aranĝos grandan ekspozicion pri la historio, kulturo, arto, literaturo, vivmaniero, moroj kaj kutimoj de la bulgara popolo, pri la forta bulgara-soveta amikeco, pri la atingoj de Popola Respubliko Bulgario en ĉiuj sferoj de la socialisma konstruado.

Ni ege petas: sendu urĝe al ni konvenajn materialojn! Nin interesas pleje afiŝoj, fotoj, bildoj, desegnaĵoj, libroj, revuoj, insignoj, poŝtmarkoj ktp. Ĉion adresu al: Samarkanda Esperanto-Klubo de Interpopola Amikeco, SU-703 000 Samarkand, glavpoŝtamt, p. k. 76, Uzbekistano, Sovetunio.

Laŭdezira rekomenco garantiita!



VIVO DEDIĈITA AL LA POPOLO

Ci-jare la frata vjetnama popolo kaj la monda progresema publiko celebras la 600an naskigdatrevenon de Nguyen (Nguyen) Trai — nacia heroo de Vjetnamio, unu el la plej elstaraj figuroj en la vjetnamiaj historio kaj literaturo, fondinto de la vjetnama klasika literaturo. Granda patrioto kaj humanisto, eminenta poeto kaj verkisto, brila milita stratego, talenta diplomato, Nguyen Trai viciĝas inter la universalaj genioj, kiuj dediĉis sian vivon kaj verkaron al la batalo por libero kaj feliĉo de sia popolo kaj la homaro.

Nguyen Trai naskiĝis en 1380 en la ĉefurbo Thang Long (nun Hanojo) en anarkia kaj maltrankvila tempo, kiam la feŭda ŝtato dronis en profunda krizo sekve de la reĝimo de latifundioj kaj servuteco. Lia patro estis akceptita kiel unu el la tri unuaj laŭreatoj de la ĉiutrigaraj konkursoj pri doktoreco, sed pro sia pleba origino ne povis viciĝi inter la mandarenaj, retriĝis al sia naskiĝvilaĝo, malfermis lernejon kaj komencis instrui. De sia patro Nguyen Trai ricevis solidan klercon.

Jam dum siaj infanaĝo kaj juneco li paciencie akumulis konojn kaj zorgeme studis la militsciencan, medicinajn verkojn, literaturon.

Dudekjara Nguyen Trai partoprenis mandarenan konkurson kaj ricevis diplomon pri doktoreco. Oni enoficiigis lin kiel estron de la Buroo de Inspekto kaj Kritiko ĉe la Reĝa Kortego, dum lia patro estis invitita plenumi la funkciojn de vicministro kaj direktoradpunkto en la Kolegio por Infanoj de la Nacio — la plej malnova vjetnama universitato, datiganta de la XI jc.

Post la okupado de Vjetnamio fare de la ĉinoj en 1406 Nguyen Trai sekvis sian patron, kiu kune kun la reĝo kaj ties familio kaj granda nombro de mandarenaj estis arestita kaj forportita en Ĉinion.

Reveninte el ekzilo en la okupitan ĉefurbon Nguyen Trai por eviti la vigan kontrolon de la ĉina administracio, kiu vane provis varbi lin per minacoj kaj korupto, estis devigita dum dek jaroj vivi ermitan vivon.

La ĉinaj regantoj decidis fari el Vjetnamio ĉinan provincon kaj pro tio sekvis politikon de asimilado. La ĉinaj moroj kaj kutimoj estis perforte enplantataj. La pli bonaj vjetnamaj libroj estis objekto de oficialaj aŭtodafoj. Ĉiuj historiaj kaj artaj trezoroj estis forabataj kaj forportitaj en Ĉinion. Lertaj metiistoj kaj kapablaj beletristoj estis milope deportitaj same en Ĉinion. Malfacila fariĝis la vivo de la vjetnama popolo.

Nur unu jaron post la okupado de Vjetnamio eksplodis multaj

ribejoj kontraŭ la invadintoj. Nguyen Trai arde deziris savi sian patrujon, sed ne aliĝis al la batalmovadoj, dubante pri iliaj motivoj kaj pri la kapabloj de ties gvidantoj. En 1417, jam 37-jara, li renkontis Le Loi, gvidanto de la rezistfortoj, kaj fariĝis lia fidela konsilanto kaj kunbatalanto.

La naciliberiga milito daŭris dek jarojn kaj en 1427 finiĝis per decida venko super la invadintoj. Dum la milito Nguyen Trai montrigis genia militstratego kaj lerta diplomato.

Kiel militestro li aplikis strategion kaj taktikon, kiuj celis „kontraŭstarigi nian mallorton al la malamika forto, ekstermi multhomajn armeojn per limigitaj fortoj“, por ke „la justa afero triumfu super la barbareco“ (el „Proklamo pri la venko super la Ngo-invadintoj“). Por li la militarto estas „afero de tempo kaj de situacio“. En letero al generalo Vuong Thong, ĉefkomandanto de la ĉinaj okupaciaj trupoj, li skribis: „Kiam oni estas en akordo kun la „tempo“ kaj kiam oni troviĝas en bona „situacio“, tio, kio ŝajnas perdita, povas konserviĝi, malgrandaj fortoj povas agi samekiel „grandaj“... La milita strategio de Nguyen Trai inspiriĝas de la granda principo: „Pli valoras konkeri la korojn ol la citadelojn.“ Li apogis sin sur la popolo por gajni la militon por sendependeco. Inter la ses faktoroj, kiuj laŭ li kaŭzas la piron de la invadintoj, estas aparte grava la morala faktoro.

Nguyen Trai estis klarvidanta politikisto kaj samtempe lertega diplomato.

Post la venko li kaj Le Loi devis fari longan kaj paciencan eksplikaboron por kvietigi la popolan deziron venĝi. Ili donis nutraĵojn, ĉevalojn, jonkojn al la armeo de la venkita malamiko ĉekape kun dukoj, grafoj, generaloj, por permesi al ĝi reveni Ĉinion.

La lukto por paco estas la ruĝa fadeno en la verkaro de Nguyen Trai, kiu spegulas la profundajn aspirojn de la vjetnama popolo. Li alvokis al ĉesigo de la milito por permesi al ambaŭ popoloj vivi normalan vivon. Jenaj versoj esprimas klare la pacamon de la poeto:

Niaj montoj kaj riveroj ekhavas
novan figuron.

La paco sekvas la militon kiel
la tago la nokton.

Por ĉiam kvietigas la kvar maroj,
ĉie blovas la vento de la renoviĝo.

Nguyen Trai lasis konsiderindan verkaron, konsistantan el: „Skribajoj en la armeo“ (kolekto de leteroj al la malamika generaloj,



ordonoj, proklamoj, adresitaj al la batalantoj). „La ribelo de Lam Son“, „Poemkolekto de Ue Trai“ (Ue Trai — lia pseŭdonimo) — ĉiuj ĉi en klasika ĉina lingvo, kaj „Poemkolekto en nacilingvo“ — enhavanta 254 versaĵojn. Tiuj versaĵoj estas la unuaj konsiderindaj verkoj en vjetnama lingvo, restintaj de la pasinteco.

La penso de Nguyen Trai estas markita de profunda humanismo. Por savi sian patrujon li devis servi al la reĝo, sed neniam li kurbigis spinon. Oni komparas lin kun gracia kaj fiera bambuso, kiu ofte restis soleca. Trai suferis vidante la senĉesajn intrigojn de la kortego kaj la sociajn maljustojn. La pureco, kiun li ne povis trovi en sia medio, klarigas lian eksterordinaran korinklinon al la naturo, kiun li forte amis.

Nguyen Trai estis multflanke disvolviginta personeco. Li verkis la unuan geografion de sia lando. Al li apartenas profundaj filozofiaj kaj literaturaj eseoj. Li povas esti komparata kun la eminentuloj de la eŭropa Renesanco.

La esperantistoj estas tro dankaj, ke okaze de la 600a naskigdatreveno de Nguyen Trai niaj vjetnamiaj amikoj eldonis esperantlingve libron pri tiu granda filo de la vjetnama popolo kaj de la tuta homaro. En la libro estas skizo pri la vivo kaj verkaro de Trai, liaj elektitaj poeziaj kaj prozaj verkoj kaj artikolo de Fham Van Dong, ĉefministro de Socialisma Respubliko Vjetnamio. La tradukojn en Esperanto majstre faris Nguyen Minh Kinh kaj Dao Anh Kha. Per tiu ĉi libro ili kontribuis por popularigo de la genia verkisto kaj humanisto.

Dimitro Hagiev

PROKLAMO PRI LA VENKO SUPER LA NGO-INVADINTOJ¹

(fragmentoj)

Sed la politiko de la Ho-reĝoj² fariĝis premeza, la popolo grumbliis de kolero. Profitante el tio la Ming-agresantoj³ okazigis la militon.

Perfiduloj vendis la patrujon por plensatigi sian apetiton. Viroj estis forbruligitaj vivaj, virinoj kaj infanoj buĉataj. Ĉinoj uzis mil ruzaĵojn por trompi la popolon, mistifiki la ĉielon.

Dudek longajn jarojn daŭris la krimo. En nia tero malaperis la virtoj de humaneco kaj justeco.

Taksoj kaj impostoj malplenigis niajn lagojn kaj montarojn. Oni devis subakviĝi funden en la maroj, alfronti ŝarkojn por liveri al ili perlojn. aventure vagi profunden en la montoj por akiri al ili oron, sin riski en salubraj ĝangaloj por rektakvi fazanojn kaj nigrajn cervojn. Nek la herboj de l'kampoj, nek plej eta insekto estis domagataj.

Malfeliĉon al niaj vidvinoj, al niaj infanoj! Ili ĝemadis pro malsato, dum la ekzekutistoj estis grasdikaj. Oni devis konstrui palacojn, ĉartransporti teron. La malamiko ĉiam postulis brakojn, brakojn, la servutoj pluvadis, la teksiloj estis forlasataj. Por registri iliajn krimojn ĉiuj bambuoj de niaj arbaroj ne sufiĉis, la tuta akvaro de l'oceano ne povus forviŝi ilian fetoron.

La kolero de l'popolo atingis sian kulminon. La tero kaj la ĉielo ne povis toleri tiajn krimojn.

Ni, retirigintaj en la Lam-monton, rigardante la suleplenajn patrujon kovis nian malamon. Dum longaj jaroj, kun koro premita de angoro, nutrite per galo, kuŝante sur dornoj, forgesante manĝi, ni studis ĉiujn strategiojn, esploris la pasinton, mezuris la estonton, prikonsideris la faktorojn de l'venko. Ni levis la standardon ĝuste kiam la malamiko estis ĉe la kulmino de sia forto. . . Al ni mankis konsilantoj, oficiroj, soldatoj, sed ni brulis de deziro savi la popolon. . . Kun la popolo kolektiĝinte kvazaŭ en unusola familio, ni levis la standardon de l'libero. Uzante la surprizon, ni kontraŭstarigis nian malfortecon al la malamika forto. En mil embuskoj, per limigitaj fortoj ni ekstermis multenombrajn armeojn. La justa aĉero triumfis super la barbareco. La humaneco venkis la brutalan forton. . .

La patrujo de nun estas firme starigita. Niaj montoj kaj riveroj ekhavas novan figuron. La paco sekvas la militon kiel la tago la nokton. Por mil aŭtunoj ni estas forviŝintaj nian honton, por dekmil generacioj ni jam starigis la pacon, por ĉiam kvietigis la kvar maroj, ĉie blovas la vento de l'renoviĝo.

Tradukis: NGUYEN MINH KINH

deziras korespondi

Bulgario

Bistra Dojĉinova (sur la foto) — str. Kavala, blok 42, v. D. ap. 95, 1233 Sofio (29-jara — kun ĉi — prospektoj, bk, aforismoj ka).

(Sekvas sur kovrilpaĝo III)



Solve de la vorteniĝmo en n-ro 9

1. Libera. 2. Kaliko. 3. Paroli. 4. Evoluo. 5. Oriolo.
6. Ovacio. 7. Propra. 8. Ironio. 9. Agioto. 10. Faligo.
11. Renoar. 12. Gnomoj. 13. Orango. 14. Herooj. 15. Admiri. 16. Amikoj. 17. Anonco. 18. Katuno. 19. Akacio. 20. Uranio.

INTERESAJO: RETROVITA ĈEHOV
EN ESPERANTO

En unu el la numeroj de gazeto „Dunatul“ de 1913 j. estas trovita nekonata ĝis nun hungara traduko de verko de Anton Pavloviĉ Ĉehov. La titolo estas „Veto“ (en la ruslingva originalo „Mono“). La traduko de la rakonto estas farita ne el la germana aŭ franca, kiel kutime en tiu tempo, sed el Esperanto. Ĝin faris la direktisto de la orkestro en u. Pécz (Peĉ) kaj gvidanto de Esperanto-grupo Gjúla Lajoš. Laŭ la opinio de specialistoj la traduko havas altan profesion nivelon.



MEDICINA INTERNACIA REVUO — oficiala organo de Universala Medicina Esperanto-Asocio (UMEA), aperigis en sia n-ro 1/1980 la prelegon de d-rino Mariana Georgieva Dimova el Varno, kiun ŝi faris en la jarkunveno de UMEA enkadre de la 64 UK de Esperanto en Lucerno 1979. La prelego havas jenan titolon: „La dispensiario en la kondiĉoj de la vilaĝana sanprotekto en Bulgario“.

„Ĉu vi estas observema?“, n-ro 5 de „BE“

Plej plene eltrovis la diferencojn kaj plej bone priskribis ilin k-do Vjazovcev V. N. el Sovetunio (SU 453200, Salavat 11, pr. Neftjanikov 5—12). Li estas premiita per E-libro.

MI ESTIS EN LANĈOV

Kio estas Lanĉov? Por tiuj e-istoj, kiuj ne aŭdis multe pri Lanĉov, ĝi estas simple somera E-tendaro en CSSR. Por aliaj, kiuj jam partoprenis E-kursojn tie, ĝi signifas... Sed laŭvice.

SET-Lanĉov estas parto de Esperantujol Nia Esperantujo, kiu estas nenie kaj ĉiel! La tendaro estas pitoreske situanta en arbareto apud la limo de CSSR kaj Aŭstrio, proksime al urbo Vranov en Suda Moravio. Apude troviĝas la Arĝenta Golfo — parto de granda lago. La multaj malgrandaj ŝtonetoj, kiuj brilas profunde en la akvo, donis nomon al la golfo. Multaj tendaranoj post 4-hora lernado de E-o ekkonadis la ĉirkaŭaĵon de la lago. Preter ĝiaj bordoj unu ĉe la alia staras malgrandaj lignaj dometoj en diversaj stiloj. Antaŭ ĉiu dometo — boato. Kiel en infana fabelo!

Neniu el ni forgesos la ekskursojn, kiujn ni faris al Ora Prago, al la urboj Trebič kaj Vranov, kie ni vizitis mezepokan kastelon.

Plej interesaj kaj neforgeseblaj por ni tamen restos la vesperoj ĉirkaŭ la tendaraj fajroj. Multajn kantojn oni povis aŭdi — bulgarajn, germanajn, hungarajn k. a. La recitado, kiu malkovris grandajn talentojn, ankaŭ estas memorinda. Kaj kiu forgesos la vesperon, kiam k-do Peev — nia instruisto el Pazargik, instruis ĉiujn tendaranojn iri tra ardaĵoj? La eksterlandanoj, kiuj ne estis aŭdinataj pri niaj nestinaraj dancoj, vidis per propraj okuloj, kiamaniere oni povas „promeni“ sur la varmegaj karboj. Preskaŭ ĉiuj deziris fari la samon. Estis, kompreneble, kelkaj malagrablaĵoj, sed, kiel la bulgaroj diras, „bravulo sen vundo ne ekzistas“. En tiu vespero oni elektis mian k-dinon Stefka Pojarkova „mis Esperanto“.

Nun por mi Lanĉov estas io tute konkreta: du semajnoj plenplenaj de ĝojo, ŝercoj kaj bonega humoro! La sloganon „Per Esperanto — al amikeco!“ oni povas vidi en praktiko en SET-Lanĉov!

Bistra Dojĉinova

Inĝ. Bogomil Češmeĝiev — str. Lale 11, 5180 Polski Trámbes (26-j. fraŭlo — kun GDR, Francio, Pollando, CSSR, Svedujo).

Ilijan Markov — str. Rakovski 19, 5180 Polski Trámbes (25-j. pri junulara vivo, arto, filozofio ktp.).

Krăstinka Dimitrova — str. Ropotamo 10, 5180 Polski Trámbes (35-j. instruistino).

Teodora Anastasova — str. Klokotnica 3, 5180 Polski Trámbes (30-j. fraŭlino, instruistino de lingvoj — precipe kun instruistoj de E-o kaj internaciaj kluboj).

Margarita Jordanova — str. 1 maj 20, 5180 Polski Trámbes (26-j. instruistino — pri filmoj, muziko k.a.).

Georgi Savov — kvartalo Klimentovo 5180 Polski Trámbes (30-j. uzina laboristo — sporto, ekskursoj) Rozalina Galunova — str. Ruen 35, 5180 Polski Trámbes (14-j. lernantino — kun GDR, CSSR, Pollando, Anglio, Italio).

Stojan Stojanov — str. Zavovska 5, 4210 Stamboljiski (18-j. lernanto — pri bk, emblemoj, naciaj standardoj).

Sovetunio

Frenjova Olga — ul. Melik-Karamova — 74, kv. 12, Surgut — 2, Tjumenskaja oblast, 626400 USSR (17-j. lernantino — matematiko, sporto, moderna muziko, vojaĝoj).

Komencantoj 13 — 16-jaraj — kun ĉi. kolektive kaj individue: Pionir-palaco, Esperanto-rondo, 454000 Ĉeljabinsk, USSR.

ANTAŬ LA NACIA JUNULARA REVUO DE LA E-PAROLO KAJ KANTO

La junaj e-istoj, kiel parto de la liberama bulgara junularo, estas kapitulaj de la spirito de tutpopola laborentuziasmo kaj sociopolitika aktiviĝo antaŭ du gravegaj eventoj — XII Kongreso de BKP kaj la 1300a jariĝo de Bulgario.

Sub la signo de tiuj ĉi antaŭstarantaj eventoj devas komenciĝi ankaŭ la preparo por la nacia Junulara Revuo de la E-Parolo kaj Kanto. Per siaj kantoj, recitaĵoj kaj oratorajoj en E-o la junaj partoprenantoj esprimos sian senrezervan fidelecon al la amata Partio kaj nia glora 13-jarcenta Patrolando al la bulgara-soveta amikeco kaj la internaciismo al la socialismo kaj la paco. La revuo havas konkurran karakteron. Kaj en ĝi rajtas partopreni gejunuloj 7—35-jaraj — individue aŭ kolektive — en la branĉoj: kantado, recitado kaj oratora konkurso. La temoj de la oratora konkurso estas: „Georgi Dimitrov — patrioto kaj internaciisto“ kaj „Esperanto — lingvo de la paco kaj internacia amikeco“. La partoprenantoj turnu sin al E-literaturistoj kaj bonaj konantoj de la lingvo por garantii bonkvalitan tradukon de siaj konkursoj. Dum la preparperiodo oni altigu la nivelon de la lingvoscio sub la gvido de spertaj e-istoj.

La Revuo okazos je la 4—6 de aprilo 1981 en urto Pazargik.

Gekamaradoj, preparu vin bone kaj partoprenu amase en la Revuo de la E-Parolo kaj Kanto! Ĝi estu nia plej bona manifestado dedite al la XII Kongreso de BKP kaj la 1300a datreveno de la bulgara ŝtafo.

Veročka Selivanova — Kadaka tee 173-38, 200026 Tallinn, Estonio.

Jakal Klara — ul. Gerkij 62, Vilok 295530 (28-j. instruistino).

Ilercgh Ildiko — ul. Lenin 77, Vilok 295530 (36-j. instruistino).

Beneš Ljubov — ul. 8 de Marto, 177-11, 456317 Miass — 17. (23-j. laboristino).

Bondar Nikolaj Dimitrievič — ul. Lenina 3, Maksimovka, Kremencug-regiono, Poltava-distrikto, Ukrainio, SU-315378 (23-j. studento — kun gesamaguloj).

Zaika Sergej — pr. 50 let. VLKSM 72, kv. 78, Harkov — 118, SU-310118 (29-j. inĝeniero — bk, E-libroj, teatraĵoj).

Edgar Homič — ab. jaŝĉik 4, 350 000 Krasnodar (muziko, historio, literaturo, bk, ekslibrisoj, kalendarretoj kaj).

Kolčar Magdalena — ul. Sĉerbakova 25, 295560 Korolevo (16-j. lernantino — bk).

Serdečna Natalia Ivanovna — selo Pervozvanovka, Cutovskij rajon, Poltavskaja oblast, 315062 Ukrainio (23-j. laboristino — pri ĉi. kaj bk kun bulgaroj).

Vika Kuznecova — Florilor 18/2, obŝc. PKTI, Kiŝinev, 277045 USSR (16-j. lernantino — pri arto, pm — kun e-istoj el Grekio, Hispanio, Anglio, Meksiko, Kanado, Kubo, Francio, Japanio).

Olga Kropotova — Moskovskij prospekt 12/3-31, 277045 Kiŝinev (15-j. lernantino — pri arto, nacia kulturo kaj).

Anikeev Sergej Ivanoviĉ — av. 100 Let Vladivostoka 78—22, Vladivostok-49, SU-690049 (studento — kun lingvistoj, kursgvidantoj el ĉi.).

(Sekvas sur la kovrilpaĝo)

BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO INTERNACIA ESPERANTO-KURSEJO

Bulgario, 1090 — Sofio, p. k. 791 — tel. 32-40-68

PROGRAMO 1981 — VARNA

partoprenkoltizo por eksterlandanoj			
1. APRILIO	1-14	154 levoj	
2. —	16-29	184 "	
3. MAJO	3-16	182 "	
4. —	17-30	182 "	
5. JUNIO	1-14	210 "	
6. —	16-29	210 "	
7. JULIO	1-14	168 "	(gelnantoj 11-14-jaraj)
8. —	16-19	168 "	(gelnantoj 15-18-jaraj)
9. AŬGUSTO	1-14	168 "	(gestudentoj)
10. —	11-30	200 "	(geinstruistoj)
11. SEPTEMBRO	1-14	210 "	
12. —	16-29	210 "	
13. OKTOBRO	1-14	182 "	
14. —	16-29	182 "	
15. NOVEMBRO	1-14	154 "	
16. —	16-29	154 "	
17. DECEMBRO	1-14	154 "	
18. —	15-29	154 "	
19. DECEMBRO 29. 1981 —			
JANUARO 2. 1982 (novjara balo)		100 "	

En la programo: ĉiutage 3-hora lernado de E-o kaj marbanado, kelktage projekciado de filmoj, diskoteko. Aŭtune kaj vintre la banado okazas en kovritaj basenoj kun nature varma akvo. En tiu grupo: busekskursoj al urboj Varna, Balŝik, Tolbuhin, la tombo de la pola reĝo Vladislav Varnenik, piedekskursoj al proksimaj objektoj kaj tra la ĉirkaŭaĵo.

ABONU LA PERIODAĴOJN „STARTO“ KAJ „SANO“!

Kiu volas havi informojn pri Ĉeĥoslovakio kaj ties E-movado? Kiu volas legi pri interesajoj el la ĉeĥa kaj internacia literaturo, pri la vivo de E-grupoj en ĈSR? Kiu volas havi freŝajn informojn pri la medicinista movado de e-istoj? Tiu ne atendu!

Tuj abonu la presorganon de Ĉeĥa E-Asocio „STARTO“. Kun „Starto“ vi aŭtomate ricevos ankaŭ la medicinista informilon „SANO“. „Starto“ aperas 6-foje jare, formato A5, ĉiu numero kun minimume 24 paĝoj. „Sano“ aperas 4-foje jare, ĉiam 16-paĝa.

Atendas vin ankaŭ malgranda donaceto de Ĉeĥa E-Asocio kaj la redakcio (afiŝoj, kalendaroj, glumarkoj k.s.) je la fino de la jaro. Abonprezo 3 levoj. Sumojn sendu al:

ДС Каса Благоевски район, сметка 85/1052 на Българския есперантски съюз, София.

ABONU POR 1981 J. PERE DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO EKSTERLANDAJN E-PERIODAĴOJN:

1. ESPERANTISTA FINLANDO	3 levoj
2. DER ESPERANTIST (GDR — Berlino)	0,63 levoj
3. INTERNACIISTO (eldona komunista E-grupo en Aŭstrio)	1 levo
4. SLOVAKA ESPERANTISTO	1,50 levoj
5. STARTO + SANO	3 levoj
6. ESPERANTISTA LABORISTO (Francio)	1 levo

La kvanto de ĉiu el la supraj eldonaĵoj estas limigita. Sumojn sendu al:

ДС Каса Благоевски район, сметка 185/1052 на Българския есперантски съюз, София.

(El kovrilpaĝo III)

Esperanto-klubo, ul. Uboreviĉa 25, Universitato, 690652. Vladivostok (gestudentoj 19 — 22-jaraj).

Grupo de krimaj e-istoj — kun gebulgaroj, precipe el la distrikto Ruse — pri folkloro, sociopolitikaj temoj k. a. Komuna adreso: 335 000 USSR, Sevastopol, ĉefpoŝtejo, a. k. 229, Esperanto-klubo „Velo“.

Studenta Klubo de Internacia Amikeco deziras kontakti kun similaj junularaj kluboj kaj rondoj tutmonde. Temoj: folkloro, junulara vivo, pacmovado, belarto, muziko, diskaj ktp. Adreso: 335 033 USSR, Sevastopol, Streleckaja Buĥta, SRI-instituto, korp. 4. Komitato de Komsomolo.

La membroj de la novefondita E-klubo en u. Kirov serĉas literamikojn tutmonde. Skribu al: Patruŝev Vasilij, str. K. Marksa 77-47, Kirov, USSR.

22-39-jaraj novaj kaj malnovaj e-istoj (instruistoj, inĝenieroj, oficistoj) — tutmonde pri ĉiuj temoj. Respondo certa. Komuna adreso: USSR 626 400, Tjumenskaja obl., Surgut, Dom Kulturi „Energetik“, la Esperanto-klubo.

Pollando

Piotr Olejnik — 83-300 Kartuzy, ul. Armii Czerwonej 32 (19-jara — kun bulgaraj knabinoj pri libroj,

lingvoj, magnetofonado, bk, pm k. a.)

Zygmunt Chojnacki — ul. Gagarina 12, m. 42, 93-509 Lodz (26-jara — kun gejunuloj bulgaraj pri muziko, sporto k. a.)

Urszula Wieckowska — ul. Grodzińska 1 m. 14 94-016 Lodz.

Ryszard Cislik — ul. Koscielna 1-a, 59-414 Dobromierz, woj. Walbrzych (kun el pri moderna muziko, sporto, turismo, kino, teatro, pm, bk, modrevuoj, gramdiskoj, magnetofonaj kasedoj, reciproka gastado).

Zofia Wawer — ul. Powstancow Slonskich 105/26, 53-332 Wrocław (25-jara fraŭlino — kun el pri turismo, arto, biologio, foto, pentroarto, reciproka gastado).

Tomasz Tyc — str. Oginskiego 24, m. 45, Warszawa (21-jara — turismo, geografio, sporto, lingvoj, foto, bk k. a.)

Junuloj — kun el pri ĉi. Adreso: Esperanto-klubo ĉe Zespół Szkół Zawodowych n-ro 5, ul. Tkacka 11, PL 97-200, Tomaszów Maz.

13-17-jaraj novaj e-istoj — kun el: Esperanto-grupo Liceum Ogólnokształcące, ul. Niemcewicza 1, Pruszcz Gdański.